

600–999 paŝoj – 27 baladoj

& Magdalena balado:.....	310	& Sinklarkanto:	338
& Amikoj, fratuloj:.....	312	& Prefere silenti ol fie paroli:.	340
& Senlaborulo:.....	314	& Hamburgen:.....	342
& Vespero kun junaj rusoj:.....	316	& Saluto el Varsovio:.....	344
& Mortis Grabowski:.....	318	& La serpento longa:.....	346
& Stafan stalservisto:.....	320	& Haralda balado:	349
& Balado pri Pineli:.....	322	& Mulan:	353
& Malbonŝanco:	324	& Iva balado:.....	356
& Balado pri brigo Blua Birdo el Hull:	326	& Printempa kanzono:.....	359
& Stinjeto stalservisto:	328	& La Kri':	361
& Laŭ ĉies plaĉo:.....	330	& Dolora saluto:.....	363
& Pala procesio:.....	332	& Lilka balado:.....	366
& El Ahasvero de amo:	334	& Promesoj:.....	370
& Jununjo staris kaj verŝis akvon:	336		

& Magdalena balado:

< Ripete 27 sed rekante 20 el 41 batoj por strofo, entute 615 paŝoj dum 7 minutoj. Norda Kantaro #4422. Mezepoka kristana legenda kanto pri pentema pekulino el la domo de Simon. El sveda tradukis Martin Strid (2016).>

(#Melodio:

<1,7:41> (/dodo TiTi LaLa dodo redo mi i; so mimi fa re mi i; do domi sodo dodo redo Ti Ti; So domi so dodo Ti La a; so mifa sodo dodo redo Ti Ti; So domi so dodo Ti La a;)×15)+

(&Strofoj:

'1 Magdalena iris en arbara frond'. (×; **Brilis hodiaŭ sun'**) (; Tie savanton sian ŝi renkontis. (×; **En arbareto la verda**))×

'2 Magdalena falas antaŭ sia savant'. "Trinku amikecon el mia blanka man'."

'3 "Mi ne povas trinki ĝin el via man' ĉar kun multaliaj estis vi kompan'."

'4 Unun vi infanon havis kun via patr'. Ĝin ĵetis vi en la granda mar'."

'5 Duan vi infanon havis kun via frat'. Ĝin ĵetis vi sub la granda pont'."

'6 Trian vi infanon havis kun la pastro. Tiam vi pekis en pleja drasto.

'7 Vi pardonon alie ne povas akiri ol en arbaro sep jarojn iri.

'8 Vi ne liton havu en alia lok' ol kuŝi sur alta monta rok'."

'9 Vi nenion havu alian por manĝ' ol maĉi ŝelon de pina arb'."

'10 Nenion alian trinki havu vi ol suĉi sukcon de tilifoli'."

'11 Magdalena iris en arbara frond'. Tie savanton sian ŝi renkontis.

'12 "Magdalena, liton kiel ŝatis vi?" "Kiel molanaslanugo estis ĝi."

'13 "Magdalena, kion pensis vi
pri manĝ'?" "Manĝo mia
estis kiel reĝa plad'."

'14 "Magdalena, kion pensis vi
pri trink'?" "Trink' mia
estis kiel ruĝa vin'."

'15 "Magdalena, jen finiĝas
via pun'. En la ĉielon vi
paŝu nun."

& Amikoj, fratuloj:

< Ripete 16 sed rekante 5 el 32 batoj por strofo, entute 628 paŝoj dum 7 minutoj. Norda Kantaro #4440. El sveda tradukis Martin Strid (2015).>

(#Melodio:

<:2> (

(a;Mi /Mi MiMi /La LaLa /Mi FalSo /Fa a; /MiMi MiMi /Re
ReDi /LA DiMi /Re; DiRe /Mi i /Fa a;Mi /Mi RelDi /Mi i; /MiMi
SiLa /Tildo TiLa /SiLa Tido /La

)×15)+

(&Strofoj:

'1 A/mikoj, fra/tuloj kon/sili2s
/sin ; /kiel fornup/tiĝu ĉi/jare
fratu/lin'. ; En la /ro/zo ;
kon/sili2s /sin ; /kiel
fornup/ti2ĝu ĉi/jare fratu/lin'.

'2 "Volas al vi doni ni (:
reĝfilon por edz' ; li havas pli
da or' ol riĉa Roland da
terpec'.")

(×; **En la rozo** ;)

(,; reĝfilon por edz' ; li havas
pli da or' ol riĉa Roland da
terpec'.)

'3 Sabate kaj dimanĉe eliris
mesaĝ' ; lunde kaj marde
spektiĝu la omaĝ'.

'4 Merkrede kaj ĵaŭde miksiĝis
da vin' ; vendrede kaj sabate
drinkiĝis je kulmin'.

'5 Ili drinkis dum tagoj, ili
drinkis dum du ; ne volis
novedzino iri al la litsitu'.

'6 Ili drinkis dum tagoj, ili
drinkis dum tri ; ne volis
novedzino vidi al la litlini'.

'7 Tiam envenis malgranda
mara knab' ; kaj estis li vestita
en blua la rob'.

'8 Ekstaris li ĉe tablo kaj tiel
diras ; "Mi vidas nur la
mastojn kiuj tie iras.

'9 Mi vidas nur la mastojn kaj
bluajn kaj brunajn ; kaj riĉa
Roland mem sur tio staras
tribune."

'10 Kaj ili ĉiuj lasis tiujn
vortojn pasi for ; sed la
junulino tenis la vortojn en
memor'.

'11 Emas junulino eliri tra la
pord' ; kaj kuras ŝi la vojon al
mara la bord'.

'12 Ŝi kuris sur ŝtonoj kaj sur
piedfingroj ; sed bone sin
gardis de bluaj ondadingoj.

'13 Kaj ili prenis en ŝipon ŝin ;
invitis ŝin trinki da medo kaj
vin'.

'14 "Dio min gravis de
infanetoj ; mi fermis la pordon
kaj for de tie tretis."

'15 "Mi vidas sur via eta
blanka fingro ; ke tie ĝis
hieraŭ ne estis nuptoringo."
.....

'16 "Mi vidas sur via orflava
harar' ; ke tie ĝis hieraŭ ne
nuptokrono staris."

'17 "Mi vidas je via neĝblanka
mam' ; ke ili ne konsolis al iu
etinfan'."

'18 Sidiĝas junulino ĉe
Rolanda flank' ; ne sentas ŝi
malĝojon, ne sentas ŝi da
mank'.....

'19 Kuŝiĝas junulino ĉe
Roland intime ; vekiĝas ne
antaŭ ol en sepreĝa reĝimo.
.....)

& Senlaborulo:

< Rekante 35 el 53 batoj por strofo, entute 636 paŝoj dum 10 minutoj. Verkis kaj komponis Claude Piron.>

(# Melodio:

<:53> (LaTi doTi domi mado Tido TiLa Ti Ti i; redo Tido TiLa TiLa FaFa LaFa Mi Mi i;

(#Rekantaĵe: (MiLa LaLa LaTidoTi LaLa; Tido reTi Tidoredo TiTi; ReMi FaRe ReMi FaRe FaFa LaFa Mi Mi i;) \times h)

) \times 12)+

(& Strofoj:

'1 Kiom longaj estas tagoj al senlaborulo, ; kiu antaŭ tridek tagoj manĝis lastan kukon.

(\times :: **Trinku sukon, oni diris al mi, ; manĝu kukon, oni diris al mi, ; trinku sukon, manĝu kukon, vi fariĝos forta. ; Trinku sukon, oni diris al mi, ; manĝu kukon, oni diris al mi, ; trinku sukon, manĝu kukon, vi fariĝos bela.**)

'2 Venas uloj, iras uloj, longe min rigardas, ; montras mane, nekompreni; dono ne okazas.

.....

'3 Jen riĉuloj sur la strato iras tre trankvile, ; mi la monon ĝojoportan serĉas malfacile.

.....

'4 Sur la strato kun malĝojo kion eblas fari? ; Antaŭ pordo de kafejo ĉu nur sola stari?

'5 Ĉu sur strato mi plu staru aŭ ĉu mi eniru? ; Kiam estos ene mi, nu, kion mi eldiru?

'6 Ĉu sin montru la malĝojo ĉe mi sur vizaĝo? ; Ĉu bonulo venos porti kukon al la tablo?

.....

'7 Al kelnero sen kolero mi paroli devos ; kompreneble, kaj ĉu eble kafon mi ricevos?

.....

'8 Ĉu komprenos la kelnero ke mi estas senmona? ; Se li donos kafon al mi, mi fariĝos ĝoja.

'9 Aŭdu, aŭdu, geamikoj,
voĉon de la frato, ; donu
kukon, donu sukon, kune kun
la kafo.

'10 Jes, gefratoj, vi komprenu,
kiom mi malriĉas ; donu iom
da poŝmono, al mi nun
sufiĉas.

'11 Donu trinkon, donu
manĝon, donu multe, multe, ;
kaj mi donos mian foton al vi
dank-salute.

'12 Kaj per tio jen mi finas la
malĝojan kanton, ; vi min
aŭdis, vi komprenis, havu
mian dankon.)

& Vespero kun junaj rusoj:

< Ripete 48 sed rekante 8 el 64 batoj por strofo, entute 640 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Cezar. Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de & Major Brak'.>

(#Melodio:

<1,6:4> (DolRe /Mi Mi MiRe MiFa /So o lMi;

(#Rekantaĵe: FaMi /Re Re Re DoRe /Mi ilDo Do;)

DolRe /Mi Mi MiRe MiFa /So ldo lSo; Fa /Mi Mi Re Re /Do o o;

DolMi /So So La La /So o o; DolMi /So do Fa Fa /Mi i lRe;

DolRe /Mi Mi MiRe MiFa /So ldo lSo o;Fa /Mi Mi Re Re /Do o o

)×10)+

(& Strofoj:

'1 Po2st vodkonokto kaj kun vi2n' (×:: **Mili /tamtam tam, mili/ti2stoj** ;) (': ni2 pensis, ke ni banu ni3n ;) (': kaj naĝis do en lag'.) (,: ka2j naĝis do en lag' ; ka2j naĝis do en la2g'.) (': ni2 pensis, ke ni banu ni3n ;) (kaj naĝis do en lag'.)

'2 Soldatorusoj sen kalson' naĝadis laŭte kun reson'. ; Mi timis en imag'.

'3 Sed Donjo restis plu sen tim' kaj same nude banis sin, ; revenis sen zigzag'.

'4 Ŝi drinkis tiom, kiom mi, ni ege lacis pro l' ebri' ; finiĝis gaja tag'.

'5 Tagmeze venis oficir', surprize granda kavalir', ; al ni eĉ kun donac'.

'6 Matrjoŝkon li transdonis nin kaj dankis plu pro la inklin', ; pro ĝoj' kaj noktaŭdac'.

'7 "Ĝis iam", diris li kun rid', "kaj dankon plu pro via fid', ; por bela tag' en pac'."

'8 Kaj kiam ili estis for', Matrjoŝko restis por memor', ; la adiaŭdonac'.

'9 La rusoj iris for de ni, hejmlanden, sed sen iluzi', ; al tre necerta viv'.

•
'10 La fin' de amikecbrakum'
..... kondukis nin eĉ al
cerbum', ; al romp' de l'
perspektiv'.)

& Mortis Grabowski:

< Rekante 30 el 59 batoj por strofo, entute 649 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (1921) "je la naskotago de Zamenhof". Baladigis Martin Strid (2016) per nova melodio kaj rekantaĵo ĉerpita el Sinjoro Tadeo.>

(#Melodio:

<:59> (/fa fafa mimi faafafa mimi redo mimi; fa fafa mimi faafafa mimi fami rere; mi mimi fafa mimi mi mimi redo mimi; fa fafa mimi faafafa mimi redo mimi;

(#Rekantaĵe: fami re mido dodo TiTi dore mimi; fami re mido doododo fami re mi mi; fami re mido dodo TiTi dore mimi; fami re mido doododo Tire do La La)

)×11)+

(&Strofoj:

'1 /Ho, rimoj Esperantaj, nun tintu kun esploro, ; Tra l' mondo portu grandan doloron voĉo via, ; Ĉar mortis via Majstro grandpova kaj genia, ; Per kiu vi pleniĝis de vivo kaj sonoro.

(×: (; **Lando de infaneco restos por ĉiamo, ; Sankta kaj pura, kiel unua ekamo.**)×2)

'2 Ho, Muzo Esperanta, en la angul' vi sidis, ; En vestoj senornamaj, al Cindrulin' simile, ; Li vestis vin per silko, vin perlornamis brile, ; Kaj prenis vin ĉe mano, kaj vin solene gvidis.

'3 En halon de la Arto, en templon de la Belo, ; Sur via lir' li streĉis arĝentsonorajn kordojn, ; Kaj li agordis ilin, ke frapu vi akordojn ; Pli muĝajn ol tempesto, pli dolĉajn ol mielo.

'4 Via patron' li estis, de li vi lernis iri, ; De li vi lernis flugi kaj svingi vin ĝisalte, ; Portate de la ritmo, facile, danco-salte ; Parnason de Popoloj vi povis venkakiri.

'5 Alarmis li: Tagiĝas! Por gajno de trofeo ; Batalon iru, rimoj! Akiru novan gloron! ; Kaj ili kun triumfo alportis la trezoron: ; Jen Esperante revas jam sinjoret' Tadeo!

'6 Kaj vi ektuŝis korojn kaj koroj ĝermis florojn! ; Printempo de poemoj en nian rondon venis, ; Kaj ĉiu versofloro lin benis kaj solenis: ; Honorojn al la Majstro, ho gloron kaj honorojn!

'7 Ho Muzo, kvazaŭ birdo, se ĝin la frostoj tuŝas, ; Vi kun flugiloj lamaj funebras, mute, plore, ; La silkon kaj la perlojn deŝiras vi dolore, ; Ĵetite en angulon liuto via kuŝas.

'8 Ho, Muzo Esperanta, do ne sidadu mute! ; Se nun pro viaj larmoj eĉ malstreĉiĝis kordoj, ; Ekfrapu ilin tamen, eksonu la akordoj ; Obtuze, surde, ĝeme, funebre surliute.

'9 Doloron kaj funebrom sonigu, kantu krie, ; Pri la kruela bato de l' senkompata sorto, ; Ekmuĝos ĉiu sono ja kun milobla forto, ; Ĉar eĥos ĝin tra l' mondo la frataj koroj ĉie.

'10 Kaj se la kant' funebra forlarmis kaj forbruis, ; Relevu la flugilojn, denove ekflugiru, ; Ektuŝu novajn korojn, instigu kaj inspiru, ; Kiele vin la Majstro dum sia viv' instruis,

'11 Ke rimoj Esperantaj ektintu kun sonoro! ; Nur ili povas inde lin glori kaj memori, ; Nin li instruis verse ekridi, verse plori, ; Do estas ĉiu nova rim' ja lia nova gloro!)

& Stafan stalservisto:

< Rekante 23 el 31 batoj por strofo, entute 651 paŝoj dum 8 minutoj, aŭ rekante 19 el 28 batoj por strofo, entute 588 paŝoj dum 9 minutoj. Norda Kantaro #2505. El sveda tradukis Kukoleto (1993). Jen tri versioj de melodio. Al melodio #A adaptis Martin Strid. '4 Per tiu strofo kutimas finiĝi la ĝenerala versio de la kanto. '16 Brandujo. '20 Tabue estas tro laŭdi. '21 Aŭ "patron".>

(#Melodioj:

(

(#A: <1,5:31> /LaLa dodo TiSi La; dore mi rere mi; LaaLaLa dodo TiSi La; Ti dore mido Ti La h; f:doSo MiSo SoSo do; rere mi;fa mire doTi dore mido Ti La a) ?

(#Sveona:; <1,1:28> /LaLa LaSi Lado mi3;do LaLa doLa La Si; TiiTiTi rere TiTi do; LaLa doLa La Si; LaLa LaSo dore mi; fa3mi redo TiLa doTi; Ti i La a) ?

(#Malunga: <1,2:28> /dodo SoSo dore mi3;mi soso lala so mi; soososo lala soso mi; mimi redo La So; dodo SoSo dore mi; soso lala sofa mifa re e do o)

)×21)+

(&Strofoj:

'1

(&A: /Stafan estis stalservist' ;

(×:; **Tenu vin, ho ĉeval'!** ;)

akvis ĉevalojn siajn kvin

(×:; **je tiu stelo blanka ; Tag' ankoraŭ estas for, ; estas for, ; sed steloj de ĉieldeĵoro ; brilas.)**

)

?

(# Sveona kaj Malunga:

/Stafan estis stalservist'

(×:; **volonte ni nun dankas ;)**

akvis ĉevalojn siajn kvin ;

(×:; **por la stelo blanka ; Tag' ankoraŭ estas for ; steloj de ĉieldeĵoro ; brilas)**

)

- '2 Koloraj estis du je ruĝ'
bone servis sen penfuĝ'
- '3 Koloraj estis du je blank'
..... ne estis intersimilo mank'
.....
- '4 Plejbonĉevalon je pomgriz'
..... mem rajdas Stafan en
ĉemiz'*
- '5 Pre ol kriis eĉ la kok'
Stafan jam en stala lok'
- '6 Pre ol venis suno nur
bridon kaj orselon sur
- '12 Nun kristnaskas ĉiu dom'
..... kandeloj kaj picearom'
- '13 En ĉiu domo nun kristnask'
..... daŭros ĝojo ĝis la pask'
- '14 Fajro nun en ĉiu forn'
jula kaĉo kaj la pork'
- '15 Nun venas ni al via bien'
..... demandas, ĉu ni kantu jen
.....
- '16 Amata patro en lignej'
al ni el ujo* donu plej
- '17 Amata panjo ĉe la forn'
da pork' nin donu kaj el korn'
.....
- '18 Se estas ene servistin'
leviĝos kaj lumiĝos ŝi
- '19 Se ŝi ne lumigos ĝis sufiĉ'
..... ni nomos ŝin bovleda piĉ'
.....
- '20 Bonnokton, dankon, kaj en
pac' ĉar iom bonis la
donac'*
- '21 Bonnokton, dankon al
matron'* sufiĉe bonis via
don'

& Balado pri Pineli:

< Rekante 25 el 73 batoj por strofo, entute 657 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis kaj komponis? El itala tradukis? Gianfranco Molle. Baladigis Martin Strid (2015) per nova rekantaĵo kun melodio.>

(#Melodio:

(So do /mi mi mi /mi fa so /la so o /o; fa mi /re di re /re so fa /fa mi i /i; So do /mi mi mi /mi fa so /la so o /o; fa mi /mi re mi /so fa Ti /do o o /o;

(#Rekantaĵe: Sodo /mi mi mi /mi re; mi /fa fa fa /fa mi; fa /so so so /So La; TiTi /do do do /do Ti i)

)×9)+

(&Strofoj:

'1 En Mi/lan' estis /varma ves/pero/ ; Estis /varma, tre /varma ve/tero/ ; "Kapo/ralo, mal/fermu fe/nestro/n" ; Eta /puŝo: Pi/neli ne /plu/.

(×.; **Kama/rado Pi/neli ha/zarde ŝan/celis ; fe/nestron el/falis, kapo/ralo fa/talis.)**

'2 "Policestro, mi estas senkulpa ; Mi jam diris kaj ade rediras ; Anarĥio signifas ne bombojn ; Sed justecon en la liberec'".

'3 Ne fabelu, kulpulo Pineli ; Via kara kunulo konfesis ; Nur pro li la atenco sukcesis ; Kaj helpinto ja estas nur vi.

'4 Vi mensogas alkrias Pineli ; Kamarado ne ĵetis la bombon ; Ĉar farintoj de ĉi-hekatombo ; Estas mastroj kaj ne proletar'.

'5 Nu, atentu, kulpulo Pineli ; Ĉar ĉi-ĉambro jam plenas je fumo ; Se vi pluas jen estas fenestro ; Kvar etaĝoj, ne temas pri ŝerc'.

'6 Oni murdis lin ĉar
kamarado ; Kaj ne gravis de li
senkulpeco ; Anarĥio de krim'
estas speco ; Diris fia polic-
komisar'.

'7 Post ĉerko tri mil kamaradoj
; Hisas alten batalan ni flagon
; Ĉi-vespere jen estas la ĵuro ;
Ke ne haltos tiele la lukt'.

'8 Policestro kaj kunpolicanoj
; vi mortigis al ni kamaradon ;
Nur por kaŝi ŝtatan masakron ;
Sed plej akra de ni estos venĝ'.
.....

'9 En Milan' estis varma
vespero ; Estis varma, tre
varma vetero ; Kaporalo
malfermu fenestron ; Eta
puŝo: Pineli ne plu.)

& Malbonŝanco:

< Rekante 18 el 35 batoj por strofo, entute 665 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:35> (

/Lami mifa mire TiTi; fafa lafa mire TiTi; domi mire doTi LaLa;
SoSo SoSo doTi La La;

(#Rekantaĵe: mi mi mi i;fa mire doTi La a; fa fa la fa mi re; mi mi
mi i)

)×19)+

(&Strofoj:

'1 En la vilaĝet' Simuris ; Estis
granda sensacio: ; Kun azeno
enveturis ; Kolportisto Emilio.

(×: **Frap', frap', frap' ; Lin
venis sur la kap', ; Estis li
senkulpa, ; Frap', frap',
frap'.**)

'2 Kaj dum li negocojn faris ;
En la domoj nun sen peno, ;
Sole sur la vojo staris ;
Veturilo kaj azeno.

'3 La lernantoj alrapidis, ; Ĉar
ja estis ĵus tagmeze. ; Ili kriis,
ili ridis ; Kaj rigardis nun
senĉese.

'4 Ili per diversaj faroj ; Nun
ĉikanis la azenon, ; Ili tiris lin
je l' haroj ; Kaj tintigis ĝian
ĉenon.

'5 Flanke sed knabeto staris, ;
Kiu tute ne petolis, ;
Ĉikanaĵojn li ne faris, ; Ĉar li
nur rigardi volis.

'6 Jen la kolportist' revenis, ;
Kaj la knaboj lin ekvidis; Ili
tuj la librojn prenis ; Kaj
kriante forrapidis,

'7 La knabeto sed atendis, ;
Ĉar rigardi plu li volis. ; Tute
ne li timon sentis, ; Ĉar li
fakte ne petolis.

'8 Sed la viro alrapidis ; Kaj
lin kaptis sen kompato; Ĉar
aliajn li ne vidis, ; Punis lin li
per vang-bato.

'9 La maljusta vangofrapo ;
Sed la knabon tre teruris, ; Kaj
li kun ruĝega kapo ; Tuj en la
lernejon kuris.

'10 Volis li rapide iri ; Al
sinjor' la instruisto ; Kaj
plendante al li diri, ; Ke lin
batis la vendisto.

'11 Sed ĉar li doloron sentis, ;
Ĉar li estis afliktita, ; Li
nenion plu atentis ; Dum
kurad' la senhezita.

'12 Trans ŝtuparon li rapidis, ;
Kapon li antaŭen tenis; Sed la
pastron li ne vidis, ; Kiu ĵus
malsupren venis.

'13 Kaj li puŝis senatente ;
Kontraŭ l' pastro sian kapon, ;
Kaj ricevis sammomente ; Li
de Ĥ pastro vangofrapon.

'14 "Ho, atentu vi pli bone! ;
Tute blinde vi nun iris!" ; Per
kolera voĉ' admone ; Jen al li
la pastro diris.

'15 Plenĉagrene, konsternite ;
Li nun en la ĉambron iris, ; Al
la instruist' rapide ; Per
singulta voĉ' li diris:

'16 "Ho sinjor', la pastro batis ;
Sur ŝtupar' min dum alveno, ;
Kvankam mi ne petoladis ;
Kontraŭ tiu ĉi azeno."

'17 Tuj post kiam tiel plendis ;
Li malgajan sorton sian, ; Li
sur sia vango sentis ; Jam
fortegan baton trian.

'18 "Ne parolu tiel stulte ; Kaj
atentu pri konveno, ; Kaj ne
nomu vi insulte ; Vian pastron
je azeno!"

'19 Se la sorto persekutas, ;
Devas cedi homa forto. ; Kiel
ajn eĉ hom' kondutas, ; Ĉiam
venkas lin la sorto.)

& Balado pri brigo Blua Birdo el Hull:

< Rekante 31 el 61 batoj por strofo, entute 671 paŝoj dum 8 minutoj. Norda Kantaro #4480. Verkis Evert Taube (1929). El sveda tradukis Martin Strid (2010) kaj per disdivido de strofoj donis en la melodio lokon por nova rekantaĵo (2016). Tiu ŝipo vere ekzistis sed ne pereis. Klarigoj (*): '1 Hull, urbo je angla orienta marbordo. ; Soten, fjorda golfo je sveda okcidenta insularo. ; Antaŭkristnaska tago de jaro 1872. '2 Stiriston oni povas ŝnure fiksi al rudro por ke forta ŝtormo ne forlavu lin de ferdeko. ; Smögen, insulo kaj vilaĝo en Bohusleno. '3 Hällö, insulo kun lumturo. ; Middlesborough, angla havenurbo. '4 Anoj de pereanta ŝipo lumigas torĉojn por alvoki helpon. '6 Savboato alproksimiĝu de malventa flanko por ne frakasiĝi kontraŭ pereanta ŝipo. ; Vokis per forta ĝoja voĉo. '7 Metafore pri vizaĝaj trajtoj kaj vidkapablo.>

(#Melodio:

<1,4:61> (

LaTi /do dodo do redo do3lTi TiLa Ti; LaTi do dore do TiLa La a; LaTi do Tido re dore mi rimi fa; SoSo fa fafa mi lriri mi i;

(#Rekantaĵe: fami re doTi do TiLa Ti TiTi Ti; fami re fami re riri mi i; dore mi mire do remi fa3mi fari mi; LaTi do dore do TiLa La a h))×11)+

(&Strofoj:

'1 Estis /Blubird' el Hull*,
estis Blu2birdo, brig', ; kun
brajlitaj topveloj en sku' ;
neĝoŝtorma ĉe Suten* kun
glacia rig' ; julvespere en
se2pdek du*.

(×: Hurlas vento kaj muĝas
la maro en ŝtorm' ; Frapas
ondoj sur ŝipo kaj ŝer' ;
Paŝu plankon endome
sekure en la ĉen' ; Hurlas
vento kaj muĝas la mar'.)

'2 – Ŝnuru l' svedon al rudro*,
li scias je bras', ; vokis
ŝipestro, – Nova deĵor'! ; kaj
Karl Stranne el Smegen*
ŝnuriĝis al rudr' ; de Blubird',
pereonta for.

'3 Glimis Holoj-lumturo* tra
bliĝsprucoj lin ; de
ventflanko tra densa neĝpluv' ;
kaj en malvento Smegen, kun
hejmo, patrin' ; novleter' lia de
Midelsbru'*.

'4 – Nu, ĉu, Karl, preteriros ŝi
jen? -Ne, ŝipes;tro, ni torĉu*,
finiĝis vojaĝ'. ; Estas Holoj
triborde, ondrompo en
malvent', ; – Ĵetu ankrojn!
Boatojn al naĝ'!

'5 Sed ŝi ne staris plu.
Pretigiĝtan boat;on ondrompoj
forprenis al mar'. ; – Kredas
mi, diris Karlo, eliris jam
pat;ro renkonte, mi fidas al
patr'.

'6 – Jen boato malvente*, 'stas
patro – Ni jen! ; Patro mia el
Smegen! Ha lo! ; – Jen boato,
li kantis*, jen ili, saltu en, ;
ĉiuj viroj, li savos nin do!

'7 Estis aglo*, vikingo, la
Straĉne-aĝul' ; julvespere en
sepdek du, ; prenis brandon
distilan el ŝrank' en angul' ;
ŝiprompitojn oferti je ĝu'.

'8 – Kiu nomo de l' ŝipo?
demandis li dum ; drinkojn
verŝis en pintglasojn naŭ. ; –
Brigo Blubirdo – prenis li
dekan glason, bum! ; Ĝin
frakasis al planko kun plaŭd'!
.....

'9 – Ĉu Blubirdo, ŝipestro,
Blubiĉrdo el Hull? ; Dio, kie
'stas do mia fil'? ; Kie l' knabo,
ŝipestro, pro nia savul'! ;
Mortsilentis sur benk' ĉiu vir'.
.....

'10 Ŝtormĉapelon deprenis
nun laĉnte l' aĝul' ; – Ŝparu
panjon, ŝipestro, ĉi nokt;e. Ne
nomu la brigon en mara
profund', ; ne Blubirdon eĉ
diru per vort'!

'11 Kaj ŝipestro ekstaris, jam
griza magrant', ; ŝtormo hurlis,
de liaĉj lip;oj apenaŭ aŭdeblis
tremvoĉ' al gastigant': ; – Karl
ŝnurit' forgesiĝis sur ŝip'!)

& Stinjeto stalservisto:

< Rekante 12 el 27 batoj por strofo, entute 675 paŝoj dum 7 minutoj. Norda Kantaro #4424. Notita en Dalslando en 1885 (Bondessons visbok). El sveda tradukis Kukoletto (1993 strofojn '1,2,6,7,12,13-15,19,20,24,25 --o-e) kaj Martin Strid (2014 strofojn '3-5,8-11,16-18,21-23). Klarigoj (*): '2 Stinjeto: Eta Kristina. '15 Tel = tiel. '21 Na malced' = malcedon, malobeon. '23 Romo, sidejo de la papo kaj iam imperia ĉefurbo.>>

(#Melodio:

<1,7:27> (

/La LaTi dodo doTi LaTi LaSi MilFi; SiSi Ti La a; dodo dore mi mimi mifa mido Ti i;mi Si La Tido re doTi Ti La a

)×25)+

(&Strofoj:

'1 /Loĝis kampul' sur
Orientherbeja Sa2bl' ; ho
malgranda ; havis li filinojn,
filinojn kun agrabl'. ; En nia
stalo kaŝe ŝi servis.

'2 Li havis ja kvar, jes, li
ha2vis ja kvi2n

(×:; **ho malgranda** ;)
el ili Stinjeto* plej ĉarma la
filin'

(×:; **En nia stalo kaŝe ŝi
servis.**)

'3 Estis juna duko, elrajdas li
por ĉa2s' ekvidas li
Stinjeton dum sia preterpas'

.....

'4 Aŭskultu Stinjeto, por vi jen
mia vo2rt' Ĉu vi emas
servi en re2ĝa la kort'?

'5 Tranĉigu vi vestojn por vi
de kavalir' kaj servi
stalserviste vi serĉu dum forir'
.....

'6 Ĉe la kudristo2n iras
Kristinje2t' kudrigas
nobelvestojn novajn laŭ la pet'
.....

'7 Ĉe la ŝuisto2n iras
Kristinje2t' tranĉigas
nobelbotojn novajn laŭ la pet'
.....

'8 Stinjeto ŝi rajdas al reĝa la bien' Ekstere mem la reĝo li staras por ŝi jen

'9 Se stalserviston via moŝt' bezonas dum ĉi jar' mi emas reĝan korton servadi per ĉi far'

'10 Bezonas mi serviston plej urĝe en la stal' Mi nutros pri servisto sed ne lia ĉeval'

'11 Jen la juna duko, li staris apud li Se patro la serviston, ĉevalon nutros mi

'12 Dum tago ŝi rajdas ĉevalojn en herbej' dum nokto ŝi dormas ĉe l' duko en la lit'

'13 Dum tago ŝi kondukas ĉevalojn al la a2kv' dum nokto ripozas sur la duka brak'

'14 Strange grasiĝis nia stalservisto nu2n Ne povas li rajdi se varmas jam la sun'

'15 Strange dikiĝis nia stalservisto te2l'* Ne povas li alsupri ĉevalon en la sel'

'16 Stalservisto nia strangiĝis je humo2r' li ne povas boton de piedo tiri for

'17 Reĝo alparolas reĝinon per la buŝ' Alvoku nun istinojn du2 por akuŝ'

'18 Ne volas mi alvoki akuŝistinojn du sed mem volas iri mi por stala kontribu'

'19 Tra stala la pordo eniris la reĝi2n' Ŝtelire sub manĝujon Stinjeto kaŝis sin

'20 Disvolvas mantelon la blu2an la du2k' Sur tiu ŝi naskas la fi2lo2jn du

'21 La duko li falas je gepatroj al pie2d' Nun patron kaj patrinon mi faris na malced'*

'22 Reĝo al la duko, tiel parolis li: Stinjeto via, certe same bonas ŝi

'23 Ni faros geedziĝon plej grandan en ĉi dom' aŭdeblos ĝi eĉ ĝis porde2go de Rom'*

'24 Grafinoj kaj princinoj ploradis en kole2r' ripozas Stinjeto sur brako de la reĝ'

'25 Grafinoj kaj princinoj ploradis en inu2nd' ĉar prenis li por si la filinon de kampul')

& Laŭ ĉies plaĉo:

< Rekante 22 el 43 batoj por strofo, entute 473 paŝoj dum 6 minutoj, aŭ rekante 22 el 31 batoj por strofo, entute 682 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid per novaj melodio kaj rekantaĵo (#Unuan 2015 kaj #Duan 2016).>

(#Melodio:

(#Unua: <:43> mi /doTi domi mido Ti Ti;re doLa LaSi Lado Ti Ti;mi doTi domi mido Ti Ti;re doLa doTi LaSi La La;

(#Rekantaĵe: mi domi so somi re do; fami doTi Lado Ti Ti; mido domi somi re; mi domi so somi re do))×11

?

(#Dua: <:31> o;mi /doTi domi mido Ti Ti;re doLa LaSi Lado Ti Ti;mi domi so somi re do; fami doTi domi re re; mido domi somi re e;mi domi so somi re do)×22

)+

(&Strofoj:

'1 (&Unua:

La /patro kun la juna filo ;
azenon portis al foiro. (×:;) La
patro en la selo sidis, ; la filo
la azenon gvidis.

(×:; **Laŭ ĉies plaĉo ni iru ;
Gravas kion ili diru ; Kun
azeno marŝas ni ; Laŭ ĉies
plaĉo ni iru.**)

(&Dua:

La /patro kun la juna filo ;
azenon portis al foiro.

(×:; **Laŭ ĉies plaĉo ni iru ;
Gravas kion ili diru ; Kun
azeno marŝas ni ; Laŭ ĉies
plaĉo ni iru.**)

La patro en la selo sidis, ; la
filo la azenon gvidis.

(×:; **Laŭ ĉies plaĉo ni iru ;
Gravas kion ili diru ; Kun
azeno marŝas ni ; Laŭ ĉies
plaĉo ni iru.**))

'2 Survoje venis hom'
renkonte, ; kaj tre indignis:
"Estas honte! Jen viro en
la sel' komforta, ; dum marŝas
la infan' malforta."

'3 La patro, je l' indigna voĉo,
; sin savi volis de riproĉo,
de la azeno do descendis ; kaj
rajdi sian filon sendis.

'4 Sed ree venis hom'
renkonte, ; kaj tre indignis:
"Estas honte! Jen knabo en
la sel' komforta, ; dum marŝas
la aĝul' malforta."

'5 La knabo, je l' indigna voĉo,
; sin savi volis de riproĉo,
do saltis de l' azena dorso. ;
Nun ambaŭ marŝis, sen
rimorso.

'6 Sed venis homo, miris
multe, ; kaj kriis: "Vere, estas
stulte! Dum vi lacigas vin
per marŝo, ; promenas la azen'
sen ŝarĝo."

'7 Do, kion fari? Patro, filo ;
demandis sin kun
maltrankvilo. Interkonsilis
kaj decidis: ; Nun ambaŭ en la
sel' eksidis.

'8 Sed ree venis hom'
renkonte, ; indignis ege:
"Estas honte! Sur povra
besto ŝarĝ' duobla! ; Fi, kia
kruelec' malnobla!"

'9 La du, en malesper', per
ŝnuroj ; l' azenon ligis ĉe la
kruroj, kaj ĝin per stango
traŝovita ; plu portis kun
klopodo ŝvita.

'10 Sed venis hom' kaj ĝis
eksceso ; ridante kriis: "Jen
frenezo! Azenon vivan oni
portas! ; Ho ve, mi de ridego
mortas!"

'11 La patro diris al la filo: ;
"Mi estas vere sen konsilo:
Ĉu la azenon do mortigi, ; aŭ
nin ĉe kol' sur branĉon ligi?"
.....)

& Pala procesio:

< Rekante 12 el 23 batoj por strofo, entute 690 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis K. Kalocsay (Streĉita kordo, 1931). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:23> (/Mi DoDo MiMi DoMi FaMi ReeRe;Re SoSo LaLa Tido TiLa SoSo;

(#Rekantaĵe: Mi DoDo MiMi DoMi FaMi Re; SoSo La TiSo MiRe Do o)

)×30)+

(&Strofoj:

'1 Ho, procesio de knabinoj palaj; ; Vizaĝoj flavaj kaj malĝoj-vualaj.

(×: **Dum en la kampoj kreskas heliant' ; ankaŭ ĝi velkas en aŭtun'.**)

'2 En la sunbrilo de l' somermaten' ; Vi marŝas, marŝas kontraŭ tag' de pen'.

'3 Atendas vin la kor-muelaj horoj ; En la fabrikoj kaj en la kontoroj.

'4 En lit' ĉifita restis la fiktiv' ; De l' dolĉaj songoj... Jen la viv' — la viv'!

'5 Funebra, longa, longa procesio ; Je l' enterigo de la iluzio,

'6 Je l'enterig' de ĝojo kaj de ĉarm' ; Vidante vin mi luktas kontraŭ larm'.

'7 La bruston peza vivo senkompata ; Jen premas plata, senespere plata,

'8 Ĝi klinas dorsojn, ŝtelas el rigard' ; La artfajraĵon de la juna ard'.

'9 Sur la vizaĝoj sidas trajt' enua ; Kaj ĉe l' okuloj jam sulketo frua,

'10 Sopiroj kuŝas en la kor' kun sven' ; Sub pezaj ŝtonoj de la taga pen'.

'11 Ho, orfaj floroj de l' ĝarden' de Dio, ; Vin ne vizitas gaja papilio,

'12 La papilio de la hor' de
am'... ; Burgone velkas via
florornam'.

'13 Ho kiel volus mi kun krio
voka ; Elŝiri vin el brak' de l'
urb' sufoka

'14 Kaj gvidi vin en kanta,
danca rond' ; Sur la deklivon
de sunbrila mont'.

15 Sur viajn harojn ŝuti
kampoflorojn ; Kolorojn
pruntu ili kaj odorojn.

'16 Rigardojn viajn ĵeti al ĉiel':
; Sin banu ili en la blua hel'.
.....

'17 Kaj vin aspergi per radioj
sunaj ; Vin ili kisu sanaj,
ruĝebrunaj.

'18 Stariĝi sur la pinto de l'
dekliv' ; Kriante: iru, ĝoju al la
viv'!

'19 Kaj pluv' de ĝojo el ĉiel'
sennuba ; En brusto seka,
sarkherbaĵa, duba

'20 Ĝermigas riĉajn spikojn de
la fid' ; Sonorilflorojn de l'
perlanta rid'.

'21 Vi dancas, sur la kapoj kun
festonoj ; Turnante ronde vin
je flutosonoj.

'22 Dum tikle, dolĉe vibras en
la spin' ; La ebrieto pro l'
miela vin'.

'23 Aŭ vi sur branĉoj vin
balancas kuŝe, ; Fruktsukojn
dolĉajn sorbas plenabuŝe,

'24 Ĝis vin al sorĉaj kampoj
logas for ; La papilio de la
ama hor':

'25 Pel-ludi, rifuĝante de l'
sopiro, ; Petole kiel nimfo kun
satiro,

'26 Spirege fali kaj kun ĝoja
trem' ; Kapitulaci al la
ĉirkaŭprem',

'27 Dum viajn kisojn per foli-
susuro ; Fluŝtante benas la
Patrin-Naturo... ..

'28 Ho plen' de l' vivo! Ho
triumfa Jes! ; La viv' Donaco
estas kaj Promes'!

'29 Ekpalas, falas, mortas
iluzio ; Kaj marŝas, marŝas
pala procesio... ..

'30 Okulangule gutojn du de
plor' ; Mi viŝas honte, kun
senpova kor'.

& El Ahasvero de amo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 696 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis K. Kalocsay. Baladigis Martin Strid (2016) per melodio de Drako Longa kaj rekantaĵo de Davida balado.>

(#Melodio:

<1,6:29> (

/mi mire re do dodo dore mimi; mi mire mi mi; soso fami mimi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So LaTi do o)

)×24)+

(&Strofoj:

'1 Jen sidas ŝi kun lipoj
kunpremitaj, ; Li: kun okuloj
dronaj kaj meditaj.

(×: **Bruas danco en halo,
dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj paŝas
ni en esperanto-kunven'.**)

'2 Silento. Tra l' ĝarden' la
vent' aprila ; Balaas en la
posttagmezo brila

'3 Foliojn postrestintajn de
aŭtuno, ; Kiujn ne vekos el la
mort' la suno.

'4 Li movas sin kaj ŝi ekspiras
ĝeme, ; Kaj ree regas la silento
preme.

'5 Kaj en okuloj, kun brilado
febra ; Al ambaŭ nun aperas
larm' funebra.

'6 Funebros li l' Estinton
ĝojofontan, ; Funebros ŝi l'
Estonton ne estontan.

'7 El la ĝardeno brila,
alfluginte, ; Envenas la Estinto
piedpinte.

'8 Ho, temp' ebria de la amo
juna, ; Duopoj dolĉaj en la
laŭbo luna,

'9 Konfeso, ĵuroj, kisoj, ĉio
multa, ; Mistera, rava, flirta,
dolĉe stulta!

'10 Jen, jam el ĉio restis nur
memoro, ; Libre premita floro
senodoro.

'11 Ho, kial ĝermas floro, se ĝi
falas, ; Amor' la vangojn kial
forvualas,

'12 Svenema amo kial sin
ekmovas ; En kor'? Kial la
am', se ĝi ne povas

'13 Eterne daŭri? Ŝi ekspiras
ĝeme ; Kaj li kapkline, mute,
kompateme,

'14 Kun larme ama sento ŝin
rigardas, ; Sed en ĉi sento amo
jam ne ardas.

'15 Ho, bone estus kun iama
brulo ; En brakojn kapti ŝin
por dolĉa lulo,

'16 Karesi al ŝi tra l' harar'
konsole, ; Forkisi larmojn de l'
okuloj mole,

'17 Sed braketendo nur
mensoga pozo, ; Kaj kis'
konsola estus nur almozo.

'18 Ne, nepovante doni tutan
koron, ; Li ja ne faros tian
malhonoron

'19 Al eksreĝin' de ĉiu revo
sia: ; Nur sidas li en mut'
melankolia.

'20 Silento longa, langa,
longa, prema... ; Stariĝas li
kun movo hezitema.

'21 Nenia vorto, nur mallaŭta
ĝemo, ; Rideto pala, larma.
Manopremo.

'22 Mankiso. Star' konfuza,
sendecida. ; Rigidaj kruroj.
Nun, ekir' rapida.

'23 Sur ŝtupoj. Halto! Ne. Li
iras plue. ; En koridor' la paŝoj
sonas brue.

'24 Silento. Li foriris sen
reveno. ; Ŝi kaŝas siajn
vangojn en kuseno.)

& Jununjo staris kaj verŝis akvon:

< Ripete 48 el 96 batoj por strofo, entute 768 paŝoj dum 8 minutoj. Norda Kantaro #4162. El sveda tradukis Kukoleto (1993) strofojn '1-2 kaj Martin Strid (2016) strofojn '3-8. Klarigoj (*): '3 Estas subkomprenate ke la renkonto okazas dum vintro, kiam rozoj ne kreskas. '5 La iranton: sian ĉevalon.>

(#Melodio:

<1,8:3> (

(So /La a So /La La So /do o Tilre /do do; mi /so o fa /mi lre do /re e lmi /do o;)×

(mi /mi mi mi /so so mi /mi ilre La /re e; do /mi lre do /So La Ti /do o lTi /La a;)×

)×7)+

(&Strofoj:

'1 (Ju/nunjo /staris kaj /verŝis /akvon ; el /puto /la2 mal/va2rma ;)× (Kaj /venis raj/dante /ju2nu/luĉ' ; sa/lutis ju/nu2njon /ĉa2r/man ;)×

'2 "Jununjo bela, jununjo ĉarma ; vi staras kial sola jen? Ĉu volas vi esti mia amat' ; kaj sekvi min transsablejen?"

.....

'3 "Vian kore karan mi volas esti ; venigu al mi tri rozojn kiuj en ĉi jaro kreskis* kaj ; sur propraj radikoj ripozas."

.....

'4 Fraŭl' rajdas montojn kaj valprofundon ; sed roz' nenie ekzistas Rajdas li antaŭ pentrista pord' ; kaj ene estis pentristo.

'5 "Se estas vi ene, elvenu vi ; kaj pentru por mi tri rozojn kiuj en ĉi jaro kreskus kaj ; sur propraj radikoj ripozus."

.....

'6 La fraŭlo kiam la rozojn ricevis ; la iranton* lasis li kuri "Ĝoju vi, ĝoju vi, bela jununjo ; jen mi la rozojn akiris."

'7 Kiam jununjo la rozojn
ekvidis ; komencis ŝi ĝenĝemi
..... "Mi diris la vortojn kiel
blagon ; mi ne kredis ke vi ĝin
celos."

'8 "Se tion diris vi por blag' ;
mi prenas ĝin por blago
Mi estas via kaj vi estos mia ;
en ĉiuj niaj vivtagoj."

& Sinklarkanto:

< Rekante 13 el 41 batoj por strofo, entute 779 paŝoj dum 9 minutoj. Norda Kantaro #4460. Pri la batalo de Kringen la 26-an de aŭgusto 1612 en Kalmara Milito inter Danujo kaj Svedujo. Verkis Edvard Storm (1781). Melodio de feroa ĉendanco. El malnova dana tradukis Martin Strid (2014). Klarigoj (*): '1 Gudbrands dal, "Orfajra valo", estas norvega valo kaj provinco. '7 Romsdal, vala provinco inter Gudbrandsdal kaj la maro. '10 Fajroj avertaj bruliĝis sur montoj por signali pri eka danĝero. '12 Våge, Lessø kaj Lom estas parokoj. '13 Laügen estas la rivero en Gudbrandsdalo. '14 Nudulo, aŭ Nikso, mita homsimila estaĵo danĝera en rapidfluo.>

(#Melodio:

<:41> (/do Ti LaLa La La Ti do o;Ti LaTi do rere do TiTi; re do Ti LaLa La LaLa Ti do o;Ti LaTi do rere do TiTi;

(#Rekantaĵe: La do La Si i;La LaLa La LaTi do Ti i La a)

)×19)+

(&Strofoj:

'1 /Sinklar iris trans sala mar' ;
li al Norvegujo direktus ; li
trovis tombon en Gudbrand-
rokar'* ; kaj frunto tuj sanga
aspektos.

(×:; **Ek antaŭ tag'** ; **ja venas ili trans sablejo.**)

'2 Ho Sinklar iris sur blua ond'
; por sve2da soldo batali ; Dio
vin helpu, vi devos grondi ; en
herbon pro norvego fali.

'3 Luno palas en nokta ven' ;
trankvile la ondoj susuras ; el
akvo levas sin siren' ; al
Sinklar malbonon aŭguras.

'4 Returnu re, vi skota vir' ;
vin temas ja vivpereen ;
Norvegujen veninte, jen vera
dir' ; neniam vi venos reen.

'5 Mave kantas vi, venena
ogr;o ĉar malbonŝancon
profetas, ; kaj se mi vin kaptos
en manovr;o vin dishakigi mi
pretas.

'6 Li velis tagojn, li velis tri ;
kun si2a soldularo ; matenon
kvaran, norveguja vid' ; ne
volas mi veron bari.

'7 Al Romsdal-bordoj* lin
portis vent' ; deklaris sin
malamiko ; lin sekvis viroj mil
kvarcent ; kun malbona celo
implika.

'8 Profanan bruliron ili puŝis ;
homojn ĉiujn malhonoris ; ilin
aĝula senpovo ne tuŝis ; kaj
kraĉis vidvinon en ploro.

'9 Mortiĝis bebo en panja sin' ;
eĉ kvankam rideto suris ; sed
famo pri ĉi mizera kulmin' ; al
centro de l' lando kuris.

'10 Fajro flamis* kaj kuris
mesaĝ' ; de unu al sekva
najbaro ; ne fuĝis filoj de vala
vilaĝ' ; devis pravigi Sinklaro.
.....

'11 Soldato iris al reĝa milit' ;
ni mem devas landon defendi ;
krimbando estu malbenit' ;
nun sangon malvolas atendi!
.....

'12 Kampuloj de Voge, Lesej
kaj Lum* ; kun akraj hakiloj
sur kolo ; en Bredebojd'
kunvenis dum ; kun skoto
volis parolon.

'13 Sub deklivon apudpasas
pad' ; ni povas je Kring indiki
; preterhastas Laŭgen-fluad'* ;
en ĝin falos la malamikoj.

'14 Fusilo pendas ne plu sur
mur' ; ĉar celos pafistoj tre
spertaj ; malsekan barbon
levas Nudul'* ; sopiras al
predoj ofertaj.

'15 Unuan pafon jen Sinklar
cel' ; li kriis kaj ĉesis spiri ; la
skotoj vokis: Falis kolonel' ;
nin Di' de l' danĝero tiru!

'16 Antaŭen kampuloj!
Antaŭen norveg'! ; Disbatu,
disbatu for! ; Sopiris skoto
hejmen re ; li ne havis ridan
humoron.

'17 Kadavroj Kringon kvazaŭ
lavango ; sufiĉe korakoj voros
; pro fluo ĉi de juna sango ; la
skotaj knabinoj ploros.

'18 Vivanta hejmen venis
neniu ; por al samlandano
rakonti ; kiom danĝeras viziti
tiujn ; loĝantajn en norvegaj
montoj.

'19 Plu staras fosto en sama
lok' ; niajn malamikojn minaci
; ho jen por ĉiu norvego
provok' ; por vidon lian
aŭdaci!)

& Prefere silenti ol fie paroli:

< Rekante 27 el 41 batoj por strofo, entute 779 paŝoj dum 8 minutoj. Norda Kantaro #4472. El sveda tradukis Kukoletto (loE). Klarigoj (*): '1 La vortoj ne portas signifon. '2 Ĉoj = viraj ili. '8 Kvej = kie. '11 Aĝi kiel la diablo: Esti tre maljunega. '12 Lagon de barita rivereto havas perakvoforta muelilo. '14 Laŭ malnova superstiĉo, sorĉistinoj ne sinkas en akvo. '19 Tel = tiel.>

(#Melodio:

<1,8:> (So /do dodo mi miSo /do do mi i; /do o mi i /do La So o;So /do domi so soso /fami fare mi i;do /La Lado So o;do /La Lado So o;So /do do remi fare /do Ti do o)×19)+

(&Strofoj:

'1 Sin /interkonsilis fri/ponoj du ; /skru ru /rumpum pej ; la /muelistfilinon a/tingu ili, ĉu ; Ĉar /treton en tru' ; jen /puŝas la sku' ; ĉar /treto kuŝas en la /trota rej.*

'2 Ĉoj* metis unun do en sak (×:; **skru ru rum pum pej ;**) ĝin portis l' alia al muelista lag'

(×:; **Ĉar treton en tru' ; jen puŝas la sku' ; ĉar treto kuŝas en la trota rej.)**

'3 – Ho, kara muelisto, mi petas en kriz' muelu ĉi grenon sed sen kotiz'

'4 – Jes, portu la sakon al mia dom' ja nek estas rato, nek muso laŭ la kon'

'5 Do venis fripono al muelistoj pri tiu ruzaĵo malsciis ili plej

'6 Kaj kiam noktiĝis, nigriĝis la vak' komencis kaj ruli kaj rampi tiu sak' ; Ĉar treton en tru' ; jen skuas la ŝu' ; ĉar treto kuŝas en la trota rej.

'7 – Ho, kara patro, estu lum' mi kredas, en la domo ŝtelistoj estas nun

'8 Kaŝiris fripono sur piedpint' al lito kvej* kuŝis la muelistfilin'

'9 – Ne, kara panjo, lumon for
..... nur ludis la kato kun musa
plor'

'10 Respondis praanjo kuŝanta
sur forn' – Jes, kato en
botoj, ne mankas la spron'

'11 Ridetis praanjo, sendenta
afabl' ĉar same ŝi aĝis kiel
la diabl'*

'12 – Silentu, praanjo, vin
venos hont' en lagon* de
patro vi morgaŭ plaŭdont'

'13 Kaj kiam tagiĝis, kaj
lumon al tag' ŝin ĵetis ili
maldelikate en la lag'

'14 Kaj flosis* praanjo en
akva lok' ŝia ulo ululis
irante sur la rok'

'15 – Ho, ulo, vi havas ja
denton kun hok' min kaptu
je haroj kaj tiru al rok'

'16 Kaj la ulo per sia dento
kun hok' kaptis praanjon
kaj tiris al la rok'.

'17 Sed la muelisto per longa
lanc' forpuŝis praanjon al
bona pli distanc'

'18 Do nodis praanjo spiralon
el dors' kun plaŭdo ŝi tujis
al fundo sen rimors'

'19 Finiĝu tel* ĉiu praanjo de
klaĉ' kiu ne silentpovas per
peka buŝaĉ'

& Hamburgen:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 783 paŝoj dum 9 minutoj – se oni enlasas la multnomajn (en *kursiva* stilo) versojn. Verkis R. Korseti. (Originan melodion komponis Ĝ. Mole). La 59a universala kongreso de esperanto okazis en la libera kaj hansa urbo Hamburgo en jaro 1974. La elekto de nova estraro de UEA ne estis simple rutina proceduraĵo. Verko, kies nomindekso estas ĉi tie ekspluatata, detale priskribas la okazintaĵojn. La kanzono simple resumas tiun verkon. Baladigis Martin Strid (2015) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por La plej granda kulpulo.>

(#Melodio:

<1,5:29> (

/La dore mi mi mire fare mi do; do redo dodo doLa dodo doTi;

(#Rekantaĵe: La dore mi mi re falre mi; doTi reTi do Lado Ti Ti La a)

)×27)+

(& Strofoj:

'1 /Hamburgen venis fine por batalo ; malbonaj fortoj kontraŭ sia malo.

(×:; **Venu mastrino en la2 ĉen'** ; **Prenu mian manon en firma ten'**.)

'2 La bonon ja persone helpis dio ; kaj la malbonon Moskvo kaj Sofio,

'3 sed pri graveco de la puĉ-amplekso ; vi povas tamen legi en indekso

'4 de verko kiu kun aplomba kelko ; teoriumas pri la fina velko.

'5 *Albo'*, *Aleksiev*, *Ambroĵ*, *Arafat'* ; *Pikel'*, *Plat*, *Pul*, *Popoviĉ*, *Paŭer*, *Privat'*.

'6 En Kremlo estis tre konata scio ; pro neŭtraleco de ĉi-asocio

'7 ne povas laborista paradizo ; larĝiĝi ĝis Londono kaj Parizo,

- '8 *Beker, Beethoven, Berman, Benaze'* ; *Borman Martin, Borman Verner kaj Burle'*
- '9 *Marks, Miĥalski, Milojeviĉ, Minaja ; Molotov, Moric: jen kunularo gaja,*
- '10 kaj certe spite al burĝa logiko ; eĉ kunkomplotis la Pekina kliko
- '11 ĉar fortan emon sentis Maŭzedongo ; en Roterdamo ludi je pingpono,
- '12 *Brant, Breĵnev Leonid, Burda, Burival'* ; *Konor, Korseti, Ĉiĉerin, Ĉoliĉ kaj Dal*
- '13 *Dratver, Drezen, Dubĉek, Egami, Ajĥolc ; kun Ajĥhorn kaj Engels por fia negoc'*,
- '14 kaj vi ŝajne naiva esperantisto ; vi voĉdoninta por la kontraŭkristo
- '15 ĉu nia estas vi samideano ; aŭ kaŝe vi agentas por tirano?
- '16 *Gete, Gonzales Aboin', Gorki, Grec'* ; *Rosa, Rel, Ribentrop, Regulo Perc'*
- '17 *Hilova, Adolf Hitler, Hektor Hodler ; Hog, Horak, Ĥruŝĉov, Incertov, Insbruker.*
- '18 Nu, pravis la japanaj policistoj ; akvomelonoj kaj esperantistoj
- '19 ja saman havas ambaŭ la koloron ; sub verda ŝelo kaŝas ruĝan koron
- '20 *Kaloĉaj, Kaŭcki, Kaŭamura, Kiljan ; Fermas, Viŝinski, Vitek, Vogt, Varengjan*
- '21 *Lejzeroviĉ, Lajbniĉ, Ljenin, Lion-Smit ; Ŝpur, Ŝustr, Tjeri', Tileman, Josip Tit'*.
- '22 Demandu: "Kial verdas via stelo?" ; Respondos komplotintoj sen ŝancelo:
- '23 "Ankoraŭ ne maturas ĉi-insigno, ; post maturiĝo ruĝos ĝi kun digno."
- '24 *Sodjan-ruso', Ŝiler, Sekelji ; Svoboda, Sabo-Felŝe, Serdahelji*
- '25 *Zonabend, Stalin kaj Step-Bovic kaj Stren ; Luin Franko, Luter Martin kaj amen'*.
- '26 Sed eble io misfunkciis en la plano ; de Moskvo, Beogrado kaj tirano
- '27 ĉar elektiĝis fine usonano ; neŭtrale iras plu la karavano.)

& Saluto el Varsovio:

< Rekante 21 el 29 batoj por strofo, entute 783 paŝoj dum 9 minutoj. Tri poemojn verkis Antoni Grabowski (1912). Baladigis Martin Strid per islandaj melodio kaj rekantaĵoj de Olav rajdistrozo, Norda kantaro #4417.>

(#Melodio:

<1,5:29> (o;so /soososo doososo soolala so3so; mifa so mire do3;so soososo sooremi faamimi doomi;fa soso soofa milso; soso lalalaa sofa mire do dore; mire mimifaa soso lafa mi re do)×27)+

(&Strofoj:

,& Unua poemo. La pluva tago:

'1 La /tago malvarma,
malgaja, sensuna

(×:; **Se erar', li en star'** ;)

Ne haltas la ventoj kaj pluvo
aŭtuna;

(×:; **Kaj ruĝa brulis fla2m'. ;
Milde ŝarĝon li metis sub la
montkruto ; milde ŝarĝon li
metis sub la monta krut'.**)

'2 Vinujo je l' muro putranta
sin tenas, Sed ĉiu ekblovo
foliojn deprenas,

'3 Mia viva malvarma,
malgaja, sensuna: Ne
haltas la ventoj kaj pluvo
aŭtuna;

'4 Miaj pensoj sin tenas je
tempoj pasintaj, Sed falas
en vento esperoj velkintaj,

'5 Ekhaltu, ho, koro malgaja,
ne plendu! Post nuboj la
suno radias – atendu!

'6 Ne sola vi tiel kun sorto
batalas, En la vivon de ĉiu
la pluvo ja falas,

,& Dua poemo. La Reveno de l' Filo:

- '7 Post foresto multejara ;
Venas filo mia kara;
- '8 El migrado ĉiulanda ; Venas
filo mia granda!
- '9 En kabano mankis pano, ;
Do elmigris li, infano:
- '10 Nun revenas beljunulo ; Al
hejmlando, al Vistulo!
- '11 Kiel volus mi, patrino, ;
Premi lin al mia sino;
- '12 Doni volus mi festenon, ;
Por saluti la revenon.
- '13 Ve! ne mastras mi
kabanon, ; Nek liberan havas
manon;
- '14 Mi, en mia propra domo, ;
Estas kvazaŭ fremda homo.
.....
- '15 Ĉar al vi, fratin' pli aĝa, ;
Post kamplimo hejmvilaĝa,
.....
- '16 Brilas, laŭ destino dia, ;
Spel' alia, pli radia –
- '17 Do akceptu lin, fratino, ;
Per muziko kaj per vino!
- '18 Li ne vidu ĉe l' festeno, ;
Kiel premas min – ĉagreno.
.....

,& Tria poemo. Saluto el Varsovio:

- '19 Samideanoj, akceptu vi ;
Korajn salutojn el Varsovi!
.....
- '20 Akceptu ilin, tra l' tuta
mond' ; Disportu ĉien al nia
rond'.
- '21 Diru, ke ankaŭ sur pola ter'
; Batas koroj por sankt-esper',
.....
- '22 Ke ankaŭ tie, apud Vistul',
; Renkonte brilas amik-okul,
.....
- '23 Kaj etendiĝas fidela man' ;
Sonas: "Bonvenu, samidean'!"
.....
- '24 Kvankam la nokto
ĉirkaŭas nin, ; Ni kredas: Tago
brilos en fin'.
- '25 Leviĝos fine la ora sun', ;
Kie nur steloj flagretas nun.
.....
- '26 Ektondros laŭte triumfa
kant' ; Pri fina venko de l'
esperant';
- '27 Do mi nur preĝas: Ho,
donu Di', ; Ke ĝin ekaŭdu
ankoraŭ mi!

& La serpento longa:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 812 paŝoj dum 10 minutoj. Verkis Kukoleto (1986) laŭ norvega melodio de &"Drako Longa". Klarigo (*): '13 Kvel = kiel.>

(#Melodio:

<1,5:29> (

aa;Do /LAALALA TIDo ReRe Do; FaFa MiDo LA; LaLa LaLa
TiLaSo LaLa; TiTi LaSoFi Mi;

(#Rekantaĵo: SoSo FiMiRe Mi Do;Re MiFiSo FiRe Mi; dodo
LaSo MiMi SoTi La La La)

)×28)+

(&Strofoj:

'1 Ĉu /volas vi odon aŭdi nun ;
Ĉu ĉendancos vi ; Temas pri
timiga frenezo ; fraŭda
propozici'

(×:; **Herboj kreskas en
kampoj ; Flarindas la
florodor' ; Gaju pro
printempa rubekola ĥor'!**)

'2 Venis insista sciencisto, ;
serioza hom', ; havis konon pri
la neŭtrono, ; nukleofendebila
atom'.

'3 Efika pli ol uranio ; estas
plutoni'. ; Miru nun: unua sub
suno ; nova ma2teri'!

'4 Inventis Usono sub stadiono
; novaĵon el infer'. ; Ĝia pura
ra2diado ; regnas ja2m sur ter'.
.....

'5 Al japanoj uragano ; venis
trans ocean'. ; Sed estis jena ja
fenomeno, ; brilega fajroban'.
.....

'6 Homoj brulis, ombre
makulis ; sur malantaŭa mur'. ;
Ankoraŭ drivas radioaktivaj ;
eroj en la natur'.

'7 Venis poste vivokosta ; dua
forviŝa bomb'. ; Urboj tutaj
iĝis tuj mutaj, ; taŭgis nu2r
por tomb'.

'8 Post milito moninvito: ;
"Atomojn por la pac'! ;
Elektrofilia plu2tonio ; ne plu
fariĝos minac'."

'9 Reaktoroj provizoraj, ; radia
paradigm', ; utilaj staras
dekojn da jaroj, ; posteco estas
enigm'.

'10 Pri la rubo restas dubo: ;
kiel gardu ĝin? ; Ĉu gargaro
en ĝu2sta maro ; aŭ sigelo en
sa2la min'?

'11 Problemo estas, ke ĝi
restos ; perfida tradici': ; Post
fino de nia civilizacio ;
plu radiados ja ĝi.

'12 En minejoj uraniaj ;
mortigas ardezoŝakt'. ; Arboj
velkas, popoloj melkas ;
radioaktivon per lakt'.

'13 Volis Hindujo havi tuj ;
eblecon je eksterm'. ; Venis
Kanado kvel* kamarado, ;
helpis je bomba ekĝerm'.

'14 Estas nur Aŭstrie sekura ;
atoma reaktor': ; Abstinenco
antaŭ komenco ; lasis ĝin sen
labor'.

'15 Hejtis ŝargo en Harisburgo
; truon ŝajne tro, ; likis el
dresi2ta stelo ; danĝera li2kvo
do.

'16 Ŝatas franca ŝtato pranci ;
pri politika fort', ; izola sole
stara atolo ; mortas, mize2ra
sort'.

'17 Venis la vento el oriento, ;
oris la sunobril', ; forpelis
vintron de nia lando, ; vojaĝis
mejlojn mil.

'18 Subite, sen antaŭa diveno,
; sonoris radi-alarm' ; pri nova
ne konata pereco. ; For
politi2ka ĉarm'.

'19 Brulis barilo ĉe Ĉornobilo,
; rompiĝis reaktor', ; ne plu
funkciis unu pumpilo, ;
rimedo e2stis for.

'20 Malfruinformo, Soveta
normo, ; pri la akcident', ; sed
same misrapi2dis disen ;
francpubliken atent'.

'21 Faris eksplodo fremdan
jodon, ; malbenan materion: ;
Cin perfidos ti2roido, ; plaĉas
jodo al ĝi.

'22 Ĉu poste kultiviĝos
kampo, ; ĉu kreskos la tritik'? ;
Ĉu ĝin manĝi bona aranĝo ; aŭ
baldaŭ malica komplik'?

'23 Sonas multimpona stulto ;
el la parlament'; ; "Riskograda
ra2diado ; venas nu2r per
vent'."

'24 Misokazus mankoj kvazaŭ
; nur en alia land'. ; "Ĉe ni
eterne sekura kaverno ;
neniam fariĝus fand'."

'25 Kancerroj kreskas kaj
groteska ; feto en uter'. ; Pro
malsaĝo kaj pigromesaĝo ;
venenas nin atmosfer'.

'26 Kial fekundon naskis
grundo, ; kial la frondabund'? ;
Ĉu ludas hundo, flugas
hirundo ; ne pro cela profund'?
.....

'27 Ĉu vivos anstataŭ ni nur
blatoj ; en radioaktiva mond'?
; Ĉu deklaro "Homkreo eraro"
; estos al Dio respond'?

'28 Se havas ni dentojn,
spiron, sentojn, ; ruĝan sangon
en kor', ; pelu frenezan
mortokomplezon ;
radioaktivan for!

& Haralda balado:

< Rekante 19 el 33 batoj por strofo, entute 825 paŝoj dum 10 minutoj. Sur bazo de artikolo de Jens Stengaard Larsen (http://www.liberafolio.org/Members/jens_s_larsen/kiu-efektive-estis-blinkenberg) verkas Martin Strid (2016) laŭ melodio kaj rekantaĵo de feroa Foka balado (Kópakvæðið). Klarigojn vidu post la strofoj.>

(#Melodio:

#Kópakvæðið: <:33> (/SoSo SoFa MiRe SoSo; do dore dodo;
TiLa LaLa LaLaLa TiLa; LaSo SoLa SoSo;

(#Rekantaĵe: FaMi ReMi Fa So; dodo dore dodo; TiLa LaLaLa
LaLa TiLa;La LaSo SoLa SoSo; FaMi ReMi Fa So o)

)×25)+

(&Strofoj:

'1 /En popola altlernejo ;
Harald* instruas, ; Junularan
Federacion ; klere kontribuas.

(×:; **Bonas jen por danci ;
Nova estas domo, ; trajtoj
estas el ŝtal' faritaj, ;
tegmento plumba krome. ;
Bonas jen por danci.)**

'2 Diras Harald al Andreo*: ;
"Lingva profesor"! ; Pri
vortaro mi havas ideon ; sed
estas amator'."

'3 Harald estas pacifisto, ;
senperforton kredas. ; En
lernejo por rezisto* ; li prelege
pledas.

'4 Registaro de la danoj ;
postulas pli da justo. ;
Kunlaboro kun germanoj ;
kolapsas en aŭgusto*.

'5 Ekas ĝenerala striko, ;
tutlande estas. ; Okupantoj
kun svastiko ; danojn ostaĝe
arestas.

'6 Kaptas ili en Orhus-urbo* ;
dek unu korifeojn, ; inter ili
Verdaburgon* ; Harald kaj
Andreon.

'7 Harald kaj eminentuloj ;
estos mortviktimoj, ; sed
nazioj miskalkulis: ; Ĉe
Harald mankas timo.

'8 Harald en malliberej' ;
anstataŭ nenifar' ; povas per
libroj el la hejm' ; labori pri
vortar'.

'9 Vidas Andreo ĵaluza ; kiel
diletanto ; Harald sian tempon
uzas ; por lingvo Esperanto*.
.....

'10 Liberigis Andreon ili ; en
la deka tago. ; Dudek tagojn
Harald trankvilis ; en sia verka
ago.

'11 "Harald, iru el karcero, ;
vin armeo gracias!" ; "Sed
restontojn ĉu danĝero ; ĉi tie
ne minacas?"
.....

'12 "Se vi ne iros en liberon ;
kiel ni vin petis, ; vin perforte
el karcero ; devos ni forĵeti!"
.....

'13 Harald do reiris hejmen ;
"Kara mia edzin', ; karaj filoj,
mi envejne ; ĝojas vidi vin!"
.....

'14 Vintre telefonas Andre' ;
"Ĉu vi radjon aŭdis? ;
Redaktisto nazia* tre ; akre
vin malaplaŭdis.

'15 Inter partioj demokratiaj ;
en via parolad'* ; mankis tiu
de nazioj ; diras la "kamarad".
.....

'16 Dormu bone, mi esperas ;
ke mi vin revidos, ; kaj atentu,
nun danĝeras!" ; "Ĉu? Sed mi
ne timidos."
.....

'17 Tuj de Harald la amikoj ;
pro ĉi nova minaco ; estis tute
en paniko ; kaj agis per
sagaco.

'18 Ili Haraldon igis fuĝi ;
trans maron al Sveduj', ; poste
lia domo ruĝis, ; pro
eksplodo* tuj.

'19 Kun la familio "sub
grundo"* ; Harald konaton ;
rerenkotis trans la Sundo* ; –
profesoron Blatt*.

'20 "Blatt, saluton, kun
Andreo ; antaŭ la milito ; pri
faŝismo vi ideon ; havis* , ĉu,
sen spito?"

'21 Andreo pri la lingvo franca
; estas ege sperta. ; Li vortaron
tre nuancan ; verkas majstre
lerta.

'22 Harald lasis ĉe li spuron ;
pro sia metodo: ; Por Andreo
la kulturo ; devas esti klopodo.
.....

'23 "Vidis mi viron sen hezito
; tajpi sian vortaron ;
esperantan dum milito ; sen
kulturaj baroj.

'24 Sed ne povas tiom facila ;
esti lingva vojo ; dum suferas
mi humila ; laboris li kun
ĝojo."

'25 Dek jarojn post la fuĝa
dramo ; en Montevideo ;
kontraŭ Esperanto malamon ;
montris Andreo*.

<&Notoj:

- Klarigoj(*):
- '1 Harald Grønberg (1899-1984), danespo kaj instruisto.
- '2 Andreas Blinkenberg (1893-1982), profesoro pri franca lingvo kaj romanistiko en universitato de Århus 1934-1963.
- '3 Kontraŭ germanoj naziaj kiuj dum 1940-1945 Danujon okupis.
- '4 En la jaro 1943.
- '6 Dane Aarhus aŭ Århus ; "Grøn borg" signifas "verdandurgon".
- '9 Harald publikigis danan-esperantan vortaron en 1949.
- '14 Helge Bangsted (1898-1974), ĵurnalisto, estro de la dana nazia partio 1942-1945.
- '15 En urbo Skive.
- '18 Nazioj eksplodigis ĝin.
- '19 Sub grundo: kaŝiganta ; Sundo: la markolo inter Selando en Danujo kaj Skanujo en Svedujo ; Franz Blatt (1903-1979), profesoro pri klasika filologio ek de 1934, estis unu el la dek unu arestitaj ostaĝoj en Århus.
- '20 En 1932 la universitata eldonejo de Århus eldonis libreton kun la titolo: "La faŝismo: tri prelegoj pri la nova Italio". Du el la prelegantoj estis Blinkenberg kaj Blatt.
- '25 En Argentino en 1954 Unesko-konferenco akceptis rezolucion pri Esperanto malgraŭ malestima kontraŭparolo de Andreas Blinkenberg, tiama delegito de Danujo.>

& Mulan:

< Rekante 27 el 53 batoj por strofo, entute 848 paŝoj dum 10 minutoj. El ĉina tradukis Saint-Jules Zee (El Ĉina Poezio, Beijing: El Popola Ĉinio, 1980). Popolkanto de la Nordaj Dinastioj (420-589 p.K.). Baladigis Martin Strid (2016) per ĉina melodio tradicia kaj aldonis rekantaĵon sur bazo de Disney-filma versio.>

(#Melodio:

<:53> (/TiLa SoTi TiLa Lado SoSo SoMi; ReMi DoRe SoMi
MiSo milredo doLa a;La Lado SoLa MiMi MiSo ReDo ReRe;
MilSo redo mimi MiSo milredo doLa a;

(Rekantaĵe: LaaMiMi SoRe MiSo oo;ReMi Fa aSo Re e; LaMi
SooReRe MiSo oo;ReMi /Fa aSo So oo;SOSO /LALA AADoRe
/MiMi i;SO LA FalMi i; /LaaMiMi SoRe MiSo o)

)×16)+

(& Strofoj:

'1 "/Ho2 ve! Ho ve!" Mulan'
laboras tie ; Si2dante antaŭ l'
pordo su2r teksilo, ; Sed ne
aŭdiĝas ia sono de l' naveto ;
Kro2m ripetado de ŝia2
ĝemspiro.

(×: **Viron el vi mi faros ; ke2
venku vi ; Forta kiel arbaro
; ka2j fajra kor' ; Se vi
trovos vian centron ; vi
venko2s ; Viron el vi mi
faros.**)

'2 Pri kio ja, knabino, vi
ekpensas? ; Kaj kion tiel triste
ekmemoras?" ; "Mi pri nenio
pensas, pri nenio, ; Nek ion
ajn mi triste ekmemoras.

'3 Mi nur mobilizilon
lastvespere ; Vidis, la
batalantojn ĥan' kunvokas. ;
En dekdu libroj de l' nomlisto,
ĉie ; La nomon de la patro oni
lokas.

'4 Patro ne havas ja plenaĝan filon, ; Nek mi pliaĝan fraton, do ĉevalo ; Kun ĉiaj ekipaĵoj estu preta, ; Mi anstataŭos patron en batalo!"

'5 Sur la vendplaco orienta oni ; Aĉetas por ŝi ĉevalon rapidan, ; Sur l' okcidenta -- selon, sur la norda ; Vipon kaj sur la suda ĉevalbridon.

'6 Matene adiaŭis ŝi gepatrojn, ; Vespere dormis ĉe l' Rivero Flava, ; Ne aŭdis ŝi la gepatran vokadon al filino ; Sed nur senĉesan murmuradon de ondaro sablolava.

'7 Matene adiaŭis ŝi l' riveron, ; Vespere dormis ĉe la Monto Nigra, ; Ne aŭdis ŝi la gepatran vokadon al filino, ; Nur tiratan henadon de ĉevaloj de la tribo migra.

'8 Trakuris oni fluge dek miliojn ; Tra montoj, fortikaĵoj ĝis la celo. ; La kornoj eĥis en aero frosta ; Kaj maŝkirasoj brilis en lunhelo.

'9 Mortis la general' post cent bataloj, ; Revenis la bravuloj post dek jaroj. ;

'10 La ĥan' akceptis ilin kun soleno ; En la palac' ĉe l' triumfa reveno, ; Kaj ilin rekompencis per honoraj ; Titoloj kaj grandkvant' da monoj oraj.

'11 La ĥan' demandis, kion Mulan volas, ; Kiu respondis: "Mi oficon altan ne bezonas. ; Por tuj reveni al la patra domo, mi esperas ; Ke via moŝt' kamelon flugan donas."

'12 Aŭdinte la alvenon de l' filino, ; Gepatroj kune iris al la antaŭurb' piede; ; Aŭdinte la alvenon de l' fratino, ; Ŝia fratino pliaĝa sin okupis tualete;

'13 Kaj jam tranĉilon la plej juna frato ; Akrigis kun fervor' por porko- kaj ŝafobuĉado. ; La pordon de la ĉambro ŝi malfermis, ; Kaj sur la lito side ripozetis,

'14 Demetis la soldatan kamizolon ; Kaj la malnovajn vestojn resurmetis, ; Antaŭ spegul' aranĝis la hararon ; Kaj sian tualeton ekenketis.

'15 Nun ŝi eliris al la
kamaradoj, ; Kiuj miregis
ekvidante ŝin; ; Oni pasigis
kune dekdu jarojn, ; Sed sciis
ja neniun, ke Mulan estas virin'.

.....

'16 Vira leporo kun ĝojsaltaj
kruroj ; Kaj ina kun rigardo
dolĉe brila: ; Se du leporoj tiel
iras kune ; Kiu distingi povus
do la inan de la vira?

& Iva balado:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 870 paŝoj dum 10 minutoj. Verkis kaj komponis Martin Strid modifub polsa melodio el Orsa, Svedujo.>

(# Melodio:

(/LaLa dodo milfa mire; re doTi domi; soso soso faso laso; soso mire doTi;

(#Rekantaĵe: Lado mifa mire redo doTi domi laso mimi LaTi dodo mimi doLa TiSi La a)

)×29)+

(& Strofoj:

'1 /Kantos mi bala2don de ;
Ivo Lapenna* ; trian gvidis
lukton li por ; lingvo
mondkomprena.

(×:; **En la lumon levis li
Universalan Esperanto-
Asocion* kaj la lingvon de l'
homar'.**)

'2 Ĉe Unuiĝintaj Nacioj ; estro
mondestabla ; Sciu ke la vorto
iva ; signifas igkapabla.

'3 Ĉe unua provo ankoraŭ ; nia
majstro vivis ; sed pri bo[no
de Blujido Bofronta* ; tro li
naivis.

'4 Prezentiĝus Esperanto ; en
Parizo pompa ; sed fiaskis*
pro la vanto ; de idistoj
trompaj.

'5 Post milito monda oni ;
duafoje provis ; Ligo de
Nacioj* volis ; pacan moron
trovi.

'6 Francoj diris ke ilian ;
lingvon elitan ; devas uzi tuta
mondo ; civilizita.

'7 Poste nazioj venis ; ankaŭ
faŝistoj ; estis esoj sur iliaj ;
malliberiglistoj.

'8 Hitler* Esperanton fermis ;
per perforto nuda ; nepre volis
li ekstermi ; la lingvon de la
judo.

'9 Espoj sovetuniaj devis ; por vivo batali ; en la laborkoncentrejoj ; de kamarado* Stalin.

'10 Pri bezono komunika ; imperioj surdas. ; La movadon en Rusujo ; Stalino murdas.

'11 Post la dua mondmilito ; estis rekomenco ; Unuiĝintaj Nacioj havis ; bonan pacintencon.

'12 Ĉu kolonia devos esti ; ĝia laborlingvo ; kvankam povas ni atesti ; multe pli bonan atingon?

'13 Tian lingvon oni ĉagrenos ; pro temporabaj studoj. ; Por la homoj ne konvenos ; idiomaj trudoj.

'14 Lingvo nacia malfacilas ; per esceptoj en vico. ; Por lernantoj ne utilas ; gramatika kaprico.

'15 Angla lingvo progreson drenas ; elparolon konfuzas. ; Pene oni per ĝi komprenas ; kiujn vortojn uzas.

'16 Inter la nacioj serĉas ; Ivo apogon, ; devas Esperanton defendi ; kontraŭ mensogoj.

'17 De lingvistika fako ; oni konsilon petas, ; sed jen Blinkenberga* atako ; kvazaŭ analfabetas.

'18 "Ĉu ciferojn romiajn do ; por eĉ pli granda klaro? ; Mo co mo lo i kaj vo ; signifas nunan jaron."*

'19 Fine tamen Unesko akceptis ; nian proponon ; kaj konsentis ĉiam respekti ; esperantorezonon.

'20 Dek du jarojn poste Ivo ; frontis pli grandan defion: ; Al Unuiĝintaj Nacioj ; faris ni peticion.

'21 Sepdek milionoj da homoj ; Esperanton apogis. ; Imperiaj idiomoj ; ne ilin allogis.

'22 Sed ankaŭ tiam gajnis ; koloniaj potencoj. ; Nova lingvo al ili ŝajnis ; mise konsekvenci.

'23 En universitato Kembriĝa ; du studantoj ronkis ; apud Johano Putoj prestiĝa ; estis Hamfri Tonkin.

'24 Ili regon anglan amis ; kaj fanfarone ; volis per ĝi vaste fami ; potenculojn kone.

'25 Dermod* per satiro mokis;
; "Ivo diktatoras" ; kio Ivon tre
provokis ; "Kiu vin
sponsoras?"

'26 Puĉis ne la komunistoj ; en
UKo Hamburga* ;
angloamerikaj statistoj ; lerte
dramaturgas.

'27 Post la fia kalumnio ; estas
mia sento: ; Al la monda
asocio ; mankas jam la dentoj.
.....

< **Klarigoj al Iva balado:**

'1 Ivo Lapenna (1909-1987),
kroatespo, estrarano de
Internacia Esperanto-Ligo ek
de 1938 kaj de Universala
Esperanto-Asocio ek de ĝia
fondo en 1947, ĝia ĝenerala
sekretario ek de 1955 kaj
prezidanto 1964-1974.

'2 Universala Esperanto-
Asocio, monda organizo por
esperanto refondita en jaro ...
...

'3,4 Louis de Beaufront
(elparole Luide Bofro') estis
komisiab Zamenhof
prezentonta al franca registaro
en jaro 1907 lingvon
esperanto, sed anstataŭe
prezentis propran
reformprojekton "Ido".

'28 Sed ne kredu vi ke estas ;
konspiracio, ; se oni al vi
ridetas, ; fidu al tio.

'29 Kaj naiva kredu vi ; ke ĉiuj
homoj bonas, ; kaj batalon
cedu ĉar ; perfidon vi ne
konas.

'30 Kaj la vivo estu glata ; kaj
la tero plata ; kaj ne ronda ĉar
la mondon ; vidas vi
trompata.....)

'8 Adolf Hitler, ideologo de
naziismo, diktatoro de
Germanujo 1933-1945.

'9 Kamarado, komunisma
ĉiestitolo ; Josef Stalin,
diktatoro de Sovetunio 1924-
1954(?).

'17 Andreas Blinkenberg
(1893-1982), dano, profesoro
pri romanistiko.

'18 Romie, MCMLIV estas
1954, kio estas la jaro de
Unesko-rezolucio de
Montevideo pri esperanto.

'25 Dermod Quirk,

'26 En Universala Kongreso
de Esperanto en Hamburgo en
jaro 1974,

>

& Printempa kanzono:

< Rekante 35 el 67 batoj por strofo, entute 871 paŝoj dum 9 minutoj. Verkis Jopetro Danvi'. Originan melodion komponis Ĝ. Kapa kaj kantis Ĝ. Molle. Baladigis Martin Strid per la himno de Esperanto, kiun komponis F. de Menil. Klarigoj (*): '1 La jaro 1968-a. '5 Ĉeĥoslovaka Respubliko Socialisma, kiun en tiu jaro invadis Sovetunio por venki ribelon. '8 Fama franca universitato Sorbonne.>

(#Melodio:

(# La himno de Esperanto: <1,75:>

So3So /So Mih do3So mi3do /so o mih; So3do /mi doh so3mi
mi3re /re e doh; So3So /So Mih do3So mi3do /so o mih; Ti3mi
/so mih so3fi mi3ma /fi i mih;

(#Rekantaĵe: mi3mi /fa La TiTi dore /So o Lah; La3La /Ti do
re3re ma3ma /mi i fah; So3So /So Mi do3So mi3do /so o fah;
fa3fa /mi Soh mi3re fa3Ti /re e doh; So3So /do re;)

)×13)+

(&Strofoj:

< "La sesdekoka: ĉu decida jaro? memoroj pri la sesdekoka, revoj
pri la sepdekoka, okdekoka".>

'1 estis /antaŭ majo
sesdek/oka*, ; knabi/netoj
saĝe trinkis "/koka" ; kaj
a/tente legis maga/zinojn ; ne
fu/roris ĉie la blu/ĝinoj.

(×: **Kio /estas do ĉi granda
/tio? ; Nu, ĝi /estas la
revolu/cio ; kiu /en
printempo gajnas /forton, ;**

**do dis/voku la inspiran
/vorton ; kantu /ĝoje.)**

'2 gape lernis mi en gimnazio ;
kaj min lulis dolĉe iluzioj. ;
min amuzis tute dum vesper' ;
la klaketoj lumaj de l' fliper'.

.....

'3 profesoroj tute seriozaj ;
monologis per vakuoj frazaj ;
kaj enuo regis sen insido ;
super revoj foraj de rapido.

'4 kaj subite, iun tagon sunan,
; venis brue al ni movinklino. ;
sunis, estis fine de l' trankvilo
; sunis, estis fino de aprilo.

'5 per flugiloj de l' facila
vento, ; vigle alĵetitajn de
studento ; ŝtonojn kubajn por
C.R.S.* ; tuj varmiĝis la etoso.
.....

'6 ĉiunokte, ĉiutage, ; stratoj
iĝis kraĉo sage, ; retroviĝis la
rapido, ; klaĉe blekis televido.
.....

'7 en parizo iris forta voko ;
malgraŭ ŝlima stulta moko, ;
junaj ridoj per malfermaj
buŝoj ; forfuĝigis la maljunajn
muŝojn.

'8 generalo, pro abrupta sveno,
; ekri fuĝis en baden-badeno. ;
la antikva krio al la bono ;
muĝe disradiis en sorbono*.
.....

'9 sed alvenis fine en junio ;
(io juna – etimologio!) ; la
finrevo pro la suna palo. ; estis
plena ĉiu hospitalo.

'10 iluzioj en la poŝoj, kaŝe, ;
kaj amara buŝodoro maĉe, ;
tempo kuras laŭ horloĝo trista;
koro batas laŭ inklino brusta.
.....

'11 jam dek jaroj fuĝis paŭte ;
kaj esperoj kaŝe, haŭte. ; ne
plu videblas la pavimo, ; ĉie
ĝin superas la bitumo.

'12 turoj konstruiĝas kamizole
; amasiĝas homoj laŭ-tavole. ;
en la lando regas strangaj
voloj, ; devas ĉiuj Vivi en
skatoloj.

'13 sed revenas voke la cifer' ;
– ĉu memoro ruza pri fliper'?
– ; de ĉi-deko estas jaro oka. ;
nombroj vokas urĝe. ĉu
provoka?)

& La Kri':

< Rekante 31 el 59 batoj por strofo, entute 885 paŝoj dum 16 minutoj. Verkis F. D. Murphy. Valson detruis al balada melodio Martin Strid (2015). Klarigoj (*): '11 Breĵnev, sovetunia registarestro ; Carter usona prezidanto ; Hua, ĉina registro.>

(#Melodio:

<:59> (So /mi redo re doLa So Mi; So mi redo do Tido re e; So mi redo re doLa So Mi; So La redo Ti LaTi do o;

(#Rekantaĵe: So o do o La a re e Ti TiTi Ti LaTi do re mi i; So o do o La a re do Ti TiTi Ti LaTi do So do)

)×14)+

(&Strofoj:

'1 Sur montoj kaj step' indianoj ; ĉasadas kun ruĝfamili'. ; Kaj se vi postulas parolon, ; kanjono respondas per kri':

(×: **Esperanto – estas la lingvo por ni, por ni!** ; **Esperanto – ja estas la lingvo por ni, por ni!**)

'2 En densa Afrika ĝangalo ; sovaĝaj nigruloj sen Di' ; jam solvis la lingvan problemon, ; per tam-tam' disiĝas la kri':

'3 Ĉe norda poluso eskimoj ; Loĝadas en neĝo, glaci' ; Kaj kiam parolo necesas ; Trans blanka dezert` sonas kri`

'4 Sur tuta ĉi vasta terglobo, ; en urboj de ĉiu naci' ; troviĝas la samideanoj, ; soniĝas la tutsama kri':

'5 Indianoj, eskimoj, nigruloj, ; urbanoj, kaj buboj, kaj ni ; jam uzas la Zamenhof-lingvon, ; do vivu, prosperu la kri':

'6 Post longa penad' kaj
turmento, ; jes, venis ja fine la
tag'; Ekflirtis en freŝa la vento
; tutmonde la verdstela flag':
.....

'7 Sur monto, en val'
fruktodona, ; en urbo, vilaĝ'
kaj kampar', ; eksonis la kanto
belsona. ; de nenombrigebla
fratar':

'8 En neĝo ĉe globaj polusoj, ;
en varmo de granda ĝangal', ;
ĉe ĉinoj kaj angloj kaj rusoj, ;
triumfis la akra signal':

'9 Survoje de fora stelaro, ;
raketoj en grandformaci', ;
urĝadis tra spaca la maro ;
gvidataj al teron de l'kri':

'10 En Unuiĝintaj Nacioj ; de
tuta la delegitar' ; aŭdiĝis tre
laŭte la krioj ; sen helpo de
tradukistar':

'11 Eĉ Breĵnev* kaj Carter*
kunsidis ; kun Hua* en ĉina
hotel', ; babilis kaj ludis kaj
ridis ; kaj kantis sub verda la
stel':

'12 "Neniam plu lingvaj
problemoj ; kaŭzigu militon
en mond'!" , ; proklamis la tri'
kun manpremoj ; kaj kantis
denove en rond' :

'13 Varmkora estiĝis la
mondo, ; paciĝis ja ĉiuj popol',
; influe de granda la rondo ;
marŝanta sub verda simbol':
.....

'14 Jes, bela fariĝis surtera ; la
vivo de ĉiaj estaĵ', ; ŝanĝiĝis la
tempo mizera ; per helpo de
verda miraĵ':

'15 Subite de l' tuta epoko ;
plu restis neniu ol mi, ; ĉar el
la ĝardeno de l' koko ; eksonis
vekiga la kri':

& Dolora saluto:

< Rekante 18 el 37 batoj por strofo, entute 935 paŝoj dum 11 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (1922) "al la hungara landa kongreso en Miskolc". Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:55>(

/mi La LaLa miimimi re dore mimi; mi do dodo miimimi re dore mi i;mi La LaLa miimimi re dore miimi; mi do dodo miimimi re doTi La;

(#Rekantaĵe: mi do dodo mimi rere dore mimi; mi dodo mimi rere dore mi; mi dodo dodo mimi rere dore mimi; mi dodo mimi rere doTi La)

?

(/mi do dodo mi mimi re doTi La La;mi do dodo mi mimi re doTi La a;mi do dodo mi mimi re doTi La La;mi do dodo mi mimi re doTi La a;La So SoSo do do rere dore mi mi;mi So So mi mi rere doTi La La;La So So dodo TiTi TiTi dore mi mi;mi do do mi mi rere doTi La a)

)×17)+

(&Strofoj:

'1 /Ne oraj trumpetoj kun ĝoja sonoro, ; Nek liro arĝenta kun silka ruband', ; Nur kordoj obtuze sonantaj de l' koro ; Salutas vin, fratoj el tiu ĉi land'.

(×: **Fremduloj dividis nian karan landon. ; Ho, malaperu tiu raba bando! ; Ĉar ni naskiĝis kaj ni kreskis sur ĉi tero ; el ĝi kreiĝis nia korpa sang'.**)

'2 Ekfrapus mi koron por festaj akordoj, ; Por gajo solena, por ĝoja ekstrem', ; Sed kuŝas senforte, malstreĉe la kordoj, ; Sub fingro frapanta eksonas nur ĝem'.

'3 Jen, poplo hungara — ŝirata de vento, ; Velkfalas jam ĝia folia ornam', ; De sud', oriento, de nord', okcidento, ; Ĝin blovas samumo de arda malam'.

'4 Ve, poplo hungara, senfrata kaj sola, ; En nuda dezerto soifas ĝis sven'. ; Jam mankas al ĝi eĉ la revo konsola, ; Pri pluvo de amo, pri pluvo de ben'.

'5 Jam kie la floroj, la zumo ebria ; En vento printempa? Jam kie la pomp' ; De fruktomatur' en aŭtuno radia? ; La trunkon mordatan minacas la romp'.

'6 Ho, poplo hungara, popolo hungara, ; Ho nova Lazaro en kria mizer'! ; Popol' senigita! Al mondo avara ; Do petu, petegu pri seka paner'!

'7 Kaj — vidu la mondon! En sanga nebulo ; Droninte baraktas la tuta homar', ; Kaj ĉie inkubo, detruo kaj brulo, ; Subpremo, malamo kaj murdoprepar'.

'8 Ho, kiu forrabis la dolĉajn momentojn ; De temp' idilia, de kora kviet', ; Stultetajn dezirojn kaj molajn revsentojn, ; Vesperojn afablajn kun roza ridet'?

'9 Ho, kiu distaŭzis la ĝojajn mienojn ; Kaj ŝtelis la ruĝon de vang' de infan', ; Plenigis per dornoj de zorg' la kusenojn, ; Ho, kiu forrabis la molon de l' pan'!

'10 Forfluis la sango... Kaj aman florĉenon ; Ni revis post longa malama sufer'... ; Ho, kiu preparis teruran venenon ; El sango fluinta, por trinko de l' Ter'!

'11 Malama venen' en sovaĝa ebrio ; Pelegas Homaron al danco de Vit'. ; Kaj ludas orkestro de ĝemo, vekrio, ; Kaj supre rikanas fantom' de Milit'!

'12 Ho fratoj, ho fratoj, se ĉiuj trezoroj ; De ĝojo, feliĉo perdiĝis eĉ jam: ; Ni premu gardante la manojn al koroj, ; Ne lasu, ne lasu la senton de Am'!

'13 Se tranças sin mem la
Homaro per glavo, ; Ni kriu
tra ĝemoj, dentgrincoj kaj ve':
; La Amo: la Pravo! ĝi estas la
Savo, ; Ĝi estas la Beno, ĝi
estas Kre'!

'14 Ĝi estas radie brilanta
lumturo ; En skua, detrua
ciklono de mar': ; Ĝin sekvos,
aŭ en ĥaoso, teruro, ; Abismo
pereos la tuta Homar'!

'15 Kaj estas la lasta moment'
por elekto, ; Kaj por la decido
pri l' propra destin'! ; Al Vivo

kondukas la unu direkto, ; Kaj
gvidas la vojo alia al Fin'!

'16 Homar', ĉu la veo ne estis
sufiĉa? ; Ĉu volas vi ĉeson de
ploro kaj ĝem'? ; Al alto
serena, al ĝojo feliĉa ; Jen
vojo, Homaro! Ho, amu vin
mem!

'17 Kaj tiam sub pompe
festantaj festonoj ; Solenaj
fanfaroj kun ĝojharmoni', ;
Kaj gorĝoj muĝantaj de
hommilionoj ; Anoncos
alvenon de l' Lando de Di'
.....)

& Lilka balado:

< Originala ripete 23 sed rekante 9 el 37 batoj por strofo, entute 962 paŝoj dum 10 minutoj. Verkis kaj komponis Martin Strid (2016). Alternativaj melodio kaj rekantaĵo estas tiuj de Vilmunda balado, Norda Kantaro #4405, rekante 20 el 34 batoj por strofo, entute 884 paŝoj dum 10 minutoj.>

(#Melodio:

(#Originala: <:37>

/(mimi soso soso somi; rere doTi LaLa;) \times 2

(mimi miTi dodo doLa; SoSo doTi LaLa;) \times 2

(#Rekantaĵe: mimi miTi dodo TiLa So SoSo LalTi do o)

)?

(#Vilmunda: <:34> /fami sofa fami mi;re rere dore mimi; miimimi fami fami faso; sofa fafamii redo;

(#Rekantaĵe: mimi fa mi re; rere dore mi; mimi mimi mi fa;so sofa fami fami reldo; mimi fa mi re e)

) \times 26)+

(&Strofoj:

'1 (&Originala:

/"Kara Lilka", diris patro, venos tuj milito. ;) \times (Por plorego kaj cikatro estas ĝi invito. ;) \times

(\times ; **Ke la tagoj de l' homaro estu pli lu2maj.**)

?

(&Vilmunda:

"/Kara Lilka", diris patro, venos tuj milito. (\times ;;) Por plorego kaj cikatro estas ĝi invito.

(\times ; **Dancu mastrino ; belan elektas mi. ; Dancu min al mano ; ja bele kiel povas vi2. ; Dancu mastrino.**)

'2 Ŝatas drakoj ŝpruci fajron,
hejmojn forbruligi. Devas
ili por salajro morton, ho,
instigi."

'3 Lilka diris al la drako ;
"Nian hejmon ŝparu
Donos mi al vi la brakon ; ne
malbonon faru."

'4 Drako ŝin respondis akre ;
"Ni rilaton rompos. Per
militaj brilparadoj ; mi armile
pompos."

'5 Lilka petis al la drako ;
"Tamen vivojn lasu. Niajn
domojn kaj kunhomojn ;
bombe ne frakasu." ;

'6 Drako spiras fajrajn
bombojn ; kaj granatoj krevas.
..... "Sed ni estas malamikoj ;
mi malami devas." ;

'7 Fajre pafe, pacon trafe ;
drako ŝin minacas. "Pacon
pledi, gracon cedi ; kiel vi
aŭdacas?" ;

'8 "Ho mia filino kara, ogrojn
tre atentu. ke fervoron
porhomon vi ne poste
pentu!"

'9 Lilka petas al patrino ; ke ŝi
staru firme. Ŝi rigardas la
filinon por protekti ŝirme.

'10 Lilka dormas en la domo ;
pordon ogro frapas. Ogro
doman pordon frapas kaj per
ungoj skrapas.

'11 Monton regas ogro, li sur ;
Lilka pordo frapas. La
najbaroj time kaj sen;move
bruon gapas. ;

'12 Ogro Lilkan alparolas ;
"Fi, vi estas judo. Mian
malamegon gregan ; mi sur
vin altrudos." ;

13 Lilka diris al elfino ; "Via
penso klaras. Inter pastroj
kaj pilastroj ; kredo vasta
staras." ;

'14 E2lfino respondas "Bone ;
venu nin renkonti. Inter
dioj provas ni ; per unu sama
ponti." ;

'15 "Viajn vortojn en la
mondo;lingvon mi tradukos
..... kaj el ĝi plej belajn
pensajn ; perlojn mi elplukos."
;

'16 "Tiujn perlojn do vi
montru ; al miaj infanoj.
Venu vi al Agla Monto ; trans
la oceanoj." ;

'17 Lilka venis aglan monton ;
trans la oceanoj. Tie
perlojn ŝi instruis ; al
elfininfanoj.

'18 Aglo super monto sia ;
soras, Lilkan vidas. Ŝin
esplori, ĉu laboris, ; fluge li
rapidas. ;

'19 "Ĉu vi nestos, longe restos
; jen sur mia monto? Mi
decidas, kaj ne fidas ; novan
enmigronon." ;

'20 "Mi al la elfidoj montras ;
brile perlajn vortojn. Ogro
trans la maro rabas ; for de ni
la fortojn." ;

'21 "Nu, vi rajtas al elfidoj ;
diri belrakonton. Sed vi ne
ekloĝu mem sur ; mian aglan
monton." ;

'22 "Vidas mi ke vi por nesto ;
branĉojn jam kolektas.

Tial mi postulas ke vi ; for de
ni direktas." ;

23 Al la hejma ogra monto ;
Lilka do revenas pro
ogridoj jam amikoj ; ŝiaj tre
ĉagrenas

'24 Lilka pledas al ogridoj ;
sed ili respondas "Nigran
la hararon vian ; baldaŭ ni
fortondas"

'25 Homojn kaj la elfojn la
ogridoj tuj forportos "Iros
vi en groton nian ; kaj vi ĉiuj
mortos."

'26 Fine en la ogran groton ;
ĉiuj devas iri Tie pro
sufoka fumo ; oni ĉesas spiri
.....)



& Promesoj:

< Rekante 28 el 61 batoj por strofo, entute 976 paŝoj dum 11 minutoj. Verkis kaj komponis Mikaelo Bronŝtein. Klarigoj (*): '4 Korno: metaforo pri kokrato.>

(#Melodio:

< 976 batoj, 11 minutoj.> (

hLa /Lado miLa h hLa /Lado miLa h; la lala /so so so ofa /mimi h h; mi fami /reLa h hlala lala /miLa h h; mimimi /mimi i imi fisi /lala a

(#Rekantaĵe: /re ere fafa fare /fa; lala fa re; /re ere fafa fala /so o o h; /so oso soso sofa /mi so la; h /mimi sisi sisi la /h h)

)×5)+

(&Strofoj:

,& Historia antaŭparolo:

'1 En /mezopoko kruc/kavaliro ; Rapidis /al milita /iro. ; Kiraso /peza – pli ol granda /ŝtono, ; Kaj por l' ed/zino – kirasa /zono.

(×: /Ĉar validas la pro/mes' – ; Unu, du, tri – ; /Post tri jaroj da for/ges'. ; /Pasos baldaŭ la tri /jaroj, kaj ; /Ĉiuj dancos ni kun gaj'/.)

'2 Nobele palis vizaĝ' diskreta, ; Ŝlosilo falis al la poŝ' sekreta. ; Kaj la edzinon li nur benis, pia: ; – Fidela estu je nomo mia.

'3 L' edzin' ploretis, naztukon prenis. ; Femurojn belajn kiraso premis. ; Kaj tutsincere promesis la edzin': ; – Sinjoro mia, mi fere amos vin.

'4 Forĝisto juna – servuto bela: ; – Ŝlosilon fari? Fu! bagatelo... ; Kruckavaliro sub pluva ŝpruco ; Jam portas kornojn* anstataŭ kruco.

'5 Ĉar la promeso – la edza mendo ; Validas post tri jaroj da atendo. ; Ne ploru edzo! La temp' degelos. ; Tri jaroj pasos. Eble ŝi fidelos.

(×: Ĉar validas la promes' – ;
Unu, du, tri – ; Post tri jaroj da
forges'. ; Pasos la tri jaroj, kaj
kun rid'. ; Fidelos ŝi al la
kokrit'.)

,& Parto unua de la promesoj:

'6 En historio – alia paĝo: ;
Fondiĝis nia organizaĵo. ;
Dum tiu fondo mi mem
aplaŭdis, ; Kaj la promesojn
unuajn aŭdis.

(×: Ĉar validas la promes' – ;
Unu, du, tri – ; Post tri jaroj da
forges'. ; Pasos baldaŭ la tri
jaroj, kaj ; Ĉiuj dancos ni kun
gaj'.)

'7 Donante ĵuron promesis oni
; Literaturon por ni eldoni. ;
Nur lernolibrojn, ne poezion...
; Ĝis nun ni reve atendas tion.
.....

'8 Pugnante bruston, promesis
fere, ; Ke ni vojaĝos – jes – ne
nur letere. ; Al eksterlando oni
grupojn sendos... ; Ni ankaŭ
tion ĝis nun atendas.

'9 Kaj sekvis pluraj promesoj
belaj ; Pri foraj taskoj kaj
proksimaj celoj, ; Pri la revuo
kaj pri la regularo. ; En revoj
pasis la unua jaro.

'10 Sed pluraj uloj komencis
knari: ; – Vi ne promesu, se ne
povas fari. ; Dum la tendaro
popol' pasia ; Proponojn
verkis por la Asocio.

'11 Promesis oni: – Ni eklaboros, ; Proponojn viajn ni tuj-tuj esploros. ; Elektos homojn – la plej akuratajn, ; Preparos planon kaj fiksos datojn.

'12 La libroj venos al vi libere, ; Tendaroj plenos ĉiusomere. ; Kontentos tute vi pri abono. ; Kaj eĉ vojaĝos, se estos mono.

'13 Promesis oni, promesis oni, ; Laciĝis langoj la promesojn doni. ; Sed taskojn oni nun havas ŝvite – ; Transmeti datojn mem alfiksitaĵn.

'14 En revoj pasis ankaŭ dua jaro. ; Promesoj multas, eĉ ne unu faro. ; Nu kial vane vi malpacienas? – ; Tri jaroj pasos – oni komencos.

,& Finvortoj:

'15 Nu jen, amikoj, mi mem forgesis, ; Ke ŝajne kanton al vi promesis. ; Babilis multe. Gitaron plukis. ; Vi opinias – mi ekkadukis?

'16 Sed miaj karaj, ne gratu dente, ; Kaj ne rigardu min elokvente... ; Ĉu la afero ne estas klara? – ; La kant' aperos ... en la okdek kvara.